


中國新道

EL POPOLA


CINIO



假日文化祭

HOLIDAY


HOLIDAY



Dezerto en sunsubiro

Foto de **CHEN CHANGFEN**







## INTER NI

### Bona rimarkigo de s-ino Vincent

Kiel disvastigi Esperanton, se oni ne povas rebati tiun oftan kritikon: "Jes, Esperanto taŭgas por la eŭropanoj, ĝi ja estas eŭropa lingvo, sed ĝi ne taŭgas por la azianoj."? Se via revuo daŭre informas pri kursoj, societoj, firmaoj, scienculoj uzantaj Esperanton, ni povas tion uzi en niaj argumentoj.

Unu nuran kritikon mi faros, nome, de kelka tempo aperas tro da fotoj tutpaĝaj, kaj ne plu sufiĉe da teksto. Tutpaĝaj estu ekz. la mezaj paĝoj kaj ambaŭ kovriloj. Aliaj fotoj aperu tie kaj tie por ilustrati la artikolojn, ĉu kolore ĉu nigre-blanke, ne gravas. Eble estas ankaŭ iom tro da agrikulturaj informoj, ne sufiĉe da kulturaj, ekz. pri lernejoj, metodoj de instruado, pri muziko, filmoj, literaturo, religio...

**JEANNINE VINCENT**  
(Francio)

*Esperanto kreita de Zamenhof havas grandan vivforton kaj estas agnoskita kiel internacia helpa lingvo. Ĝi taŭgas ne nur por Eŭropo, sed ankaŭ por Azio kaj aliaj kontinentoj, kion pruvis la fakto, ke legantoj de nia revuo dissemiĝas en 124 landoj kaj regionoj. Laŭ propono de s-inon Jeannine Vincent ni daŭre raportos en la rubriko "Esp-novaĵoj" pri disvastigo kaj aplikado de Esperanto en Ĉinio kaj aliaj landoj, por ke pli multe da homoj kredu, ke Esperanto estas esperiga lingvo. Jes, ni havas mankon, ke estas multaj bildoj en nia revuo kaj ne sufiĉaj tekstoj kaj informoj pri kulturo. Ni dankas s-ino Jeannine Vincent pro ŝia kritiko kaj plibonigos nian laboron.*

**La Red.**



# ENHAVO

- 38 **La Revolucio de 1911**
- 10 **Malgrandaj hidroelektrejoj en montvilaĝoj**
- 6 **Tangshan, 15 jarojn post la tertremo**
- 18 **Prosperu floroj de la sciencoj kaj teknikoj**
- 42 Novaj metodoj de ĉin-medicinaj kuracistoj
- 30 Baĝjiĉuan de Mengcun
- 36 Papertondaĵoj de Yuxian-gubernio
- 41 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 27 Ĉarma Narat
- 49 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**
- Ŝanhajaj domoj kun ŝtonkadra pordo
- 24 En la antikva ĉefurbo Kaifeng
- 33 **MODERNAJ VESTOJ:**
- "Reveno"

- 16 Vizito en Francio
- 22 Refoje viziti Ĉinion post 12 jaroj

54 **TRA LA MONDO:**

Jogjakarta

14 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (7):**

Brigitte Frank-Böhringer

34 **KURANTAJ AFEROJ**

48 **POR KOMENCANTOJ:**

Matene de la Patrina Tago

44 **ESP-NOVAĴOJ**

4 **INTER NI**

48 **KORESPONDI DEZIRAS**

**SUR LA KOVRILO:**

En gaja festivalo

Foto de LING YOUJUAN

2 Dezerto en sunsubiro

4 Floro

20 En fermo de E-kurso


45 Bildoj sur fotografa papero

**SUR LA DORSKOVRILO:**

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono (p. 10)
2. Tangshan (p. 6)
3. Yuncheng (p. 42)
4. Mengcun-gubernio (p. 30)
5. Narat (p. 27)
6. Kaifeng (p. 24)
7. Yuxian-gubernio (p. 36)



# TANGSHAN, 15 JAROJN

Teksto de CAO WEI

Fotoj de YAN JIN




Unu el la stratoj de Tangshan

Trinkajo-standoj sur strato




Parto de la soda fabriko






# POST LA TERTREMO




Tangshan-haveno en konstruado



En komerca strato

La Monumento de la Tertremo sur la Centra Placo de la urbo



**L**A tragikaj rakontoj postlasitaj de la tertremo okazinta en Tangshan antaŭ 15 jaroj gravurigis profunde en mia juna koro. Sed hodiaŭ, kiam mi serĉis spurojn de tiuj rakontoj sur stratoj de Tangshan, mi aŭdis alian rakonton — rakonton de nova Tangshan.

## LA SPIRITO DE TANGSHAN-ANOJ

Mi memoras, ke kiam mi estis knabo, mi kvazaŭ komprenis pli multe post ĉiu grava malsano. La Tangshan-anoj, kiuj travivis la katastrofon, kvazaŭ pli bone komprenas ol aliaj la signifon de la vivo.

La tertremo kripligis dekmilojn da Tangshan-anoj. La registaroj de diversaj niveloj bone helpis ilin en ilia vivo, tamen pro financa problemo ili ne povis vivteni ĉiujn kriplulojn. En tiu situacio la Tangshan-anoj ekkonsciis sian devon. La 32-jara laboristino Guo de la Ĝenerala Bonstatiga Fabriko de Lubei-distrikto rompis al si la lumbon kaj kruron en la tertremo. Ŝi diris al mi: “Kiam mi revenis al Tangshan en 1977 post kuracado en alia loko, mi vivis el ŝtata subvencio. Poste mi sentis min iom bone kaj pensis, ke mi devas ne dependi de la ŝtato, sed vivteni min mem. Tial mi fariĝis laboristino.”

Kompreneble kripluloj laboras kun pli multe da malfaciloj kaj peno ol ordinaraj homoj, tamen sur la ridetantaj vizaĝoj de Guo kaj ŝiaj kamaradoj mi legis ilian psikan harmonion.

En Tangshan troviĝas multaj familioj reorganizitaj post la tertremo. La familio de laboristino Liu Shulan estas unu el ili. Ĝi konsistas el naŭ membroj portantaj ses familiajn nomojn. Post la tertremo pro la peza ŝarĝo de la vivo Liu Shulan forte sopiris sian edzon mortintan en la tertremo kaj sentis vidvinan vivon malfacila. Tial ŝi venis en la hejmon de Sun, kun du filoj kaj 70-jaraj bogepatroj, kaj edziniĝis al li. Ili estas ordinaraj laboristoj, tamen ili promesis ĉe la

geedziĝo: kiel eble plej multe gajigi unu la alian kaj la familion. La simpla kaj nobla ĵuro-simila promeso kiel ligilo kompakte kunligis la familion, kiu donis al Liu Shulan varmon de amo.

Li Kefen estas ordinara Tangshan-ano. Antaŭ 15 jaroj ŝi adoptis apenaŭ unumonatan infanon. Pri ŝi EPĈ raportis en 1978 kaj 1986. Hodiaŭ ŝia adoptita filino, kiu en la tertremo perdis siajn gepatrojn, jam fariĝis svelta knabino. Vidinte, ke ŝi kokete sin apogas sur la ŝultro de la patrino, mi trovis la patrino granda. Li Kefen donis al ŝi la patrinan amon, kiu devus aparteni tute al ŝiaj filoj. Ŝi tion faris, ĉar ili ĉiuj estis suferantoj de la tertremo. Ŝi diris: “Mi devas bone flegi tiun knabinon, por ke oni sciu, ke ne pereis Tangshan kaj ankoraŭ vivas ni, Tangshan-anoj, eĉ unumonata bebo!”

## LA PAŜOJ DE TANGSHAN-ANOJ

Efektive ne pereis Tangshan. Samtempe kun la detruado de la tertremo al tiu mezgranda centjara urbo, estiĝis granda kohera forto, kiu igis krea potenco la neflekseblan karakteron de la Tangshan-anoj. Tiel ili firmdecide konstruas

la novan urbon.


S-ro Liu Jingchang, urbestro de Tangshan, diris al mi: “Ĉe la deka datreveno de la okaziĝo de la tertremo jam stariĝis la nova Tangshan konsistanta el la malnova distrikto, distrikto de orientaj minejoj kaj Fengrun-distrikto.” Nun la Tangshan-anoj havas pli grandan planon, t.e. konstrui la novajn distriktojn Nanpu kaj Havena Distrikto, tiel ke la urbo havos formon triangulan. S-ro Liu daŭrigis fiere: “Nia celo estas konstrui Tangshan efektive granda, ĉemara urbo malfermita al la mondo en la lastaj dek jaroj de la 20-a jarcento.”

La faktoj, kiujn mi vidis en Tangshan, diris al mi, ke la Tangshan-anoj iom post iom realigas sian grandiozan planon.

La Unua Porcelanaĵa Fabriko de Tangshan ruiniĝis en la tertremo. Post sia restariĝo ĝi ne nur havas multe pli grandan produktopovon, sed ankaŭ estas armitan per produktolinio importita el Britio, kiu ĉiujare povas produkti 5 milionojn da fajnaj ost-porcelanaĵoj, tiel ke ĝi fariĝis unika ĉina fabriko povanta pogrande produkti ost-porcelanaĵojn.

Je mencio de porcelanaĵa fabriko mi tuj imagis, ke ĉie en ĝi levi-

Sur produkta linio de ost-porcelanaĵoj de la Unua Porcelanaĵa Fabriko de Tangshan







Urbestro Liu Jingchang



Li Kefen, ŝia edzo kaj ilia adoptita filino

ĝas kaolina pulvoro kaj senorde amasiĝas porcelanaĵoj. Sed kiam mi enpaŝis en laborejon de la Unua Porcelanaĵa Fabriko de Tangshan je centoj da metroj longan, mi ekvidis, ke en tiu alta fabriksalo bonorde staras maŝinoj kaj streĉe laboras ĉe stabloj laboristoj en flavaj vestoj. Kun senĉesa maŝinturnado la malhelgrizaj ostporcelanaj masoj sur la produktolinio fariĝis krudaj teleroj kaj bovloj en diversaj formoj, kaj post bakado la teleroj kaj bovloj mirinde blankiĝis. Fine post polurado kaj glazurado ili fariĝis belaj ostporcelanaĵoj. La tuta procezo ne kaŭzis leviĝon de kaolina pulvoro. Iu laboristo diris al mi, ke produktado de ostporcelanaĵoj postulas puran medion, alie oni ne povas produkti bonkvalitajn produktaĵojn. Pro tio ili nun uzas gason anstataŭ aliaj brulaĵoj kaj regas la produktadon per komputilo.

Ostporcelanaĵoj estas internacie agnoskitaj kiel bonaj porcelanaĵoj. Nur malmultaj landoj povas produkti ostporcelanaĵojn. Antaŭe la ekipaĵoj kaj teknologio de la Unua Porcelanaĵa Fabriko de Tangshan estis malpli avangardaj ol tiuj de aliaj landoj. Nun dank' al la avangardaj ekipaĵoj la fabriko jam multe grandigis la produktadon kaj la ĉinaj ostporcelanaĵoj estas bonvenaj al la internacia merkato. La novaj ekipaĵoj de la

fabriko nun estas provizataj kaj baldaŭ oficiale ekfunkcios.

Nanpu estas angulo de la nova triangulo de Tangshan, je 70 kilometroj for de la malnova distrikto. Antaŭe ĝi estis kalva sal-alkalatero kun neniu kreskaĵo. Kaj hodiaŭ tie funkcias la Tangshan-a Soda Fabriko, kiu ĉiujare produktas 600 000 tunojn da sodo. Mi promenis sur ĝia ebena vojo kaj mian vizaĝon karesis agrabla zefiro alportanta bonodoron de prosperaj verdaj arboj ĉe la vojo. Mi levis la kapon kaj vidis karbonizajn turojn ĉielskrapantajn. Sed mi ne povis kredi miajn okulojn, kiam mi aŭdis, ke la tereno kun areo de unu kvadrata kilometro en la fabriko estis formita el tero, kiun laboristoj transportis per ĉaroj de loko dekojn da kilometroj fore. Mi tre kortuŝiĝis de tio.

Forlasinte Nanpu, la aŭto veturigis min rapide al la haveno de Tangshan, la lasta etapo de mia vojaĝo en la triangulo de Tangshan.

La Haveno situas 95 kilometrojn sudoriente de la malnova distrikto de Tangshan. Ĉi tie etendiĝas vasta kaj ebena sal-alkalatero, ĝia 6-kilometra bordo taŭgas por konstrui havenon, la akvo estas profunda kaj la bordo kruta kaj horizontale rekta, tial la loko estas ideala. Jam antaŭ 70 jaroj la gran-

da ĉina revolucia pioniro Sun Yatsen intencis konstrui tie grandan nordan havenon. Pro iaj kaŭzoj lia deziro ne realiĝis.

La haveno de Tangshan distancas je 64 marmejloj sudokcidente de la Haveno de Qinhuangdao kaj je 70 marmejloj nordokcidente de la Nova Haveno de Tianjin. Post ĝia finkonstruiĝo oni povos ne nur transporti abundajn produktaĵojn de Tangshan al diversaj enlandaj partoj, sed ankaŭ eksporti ilin al aliaj landoj, kio havas gravan signifon por la ekonomia disvolviĝo kaj pordomalfermo de tiu urbo. Pro tio la magistrato ellaboris en 1984 strategian planon konstrui la havenon de Tangshan. En 1989 oni komencis la konstruadon. Starante sur nova kajo, mi rigardis dragŝipon baniĝantan en vespera suno. Marakvo milde frapis la bordon, kvazaŭ ĝi estus preta bonvenigi la veturantajn ŝipojn. Vicĉefkomandanto de la konstruejo diris al mi, ke sub niaj piedoj estas la oka ankrejo por 15 000-tonela ŝipo, kiu inaŭguriĝos jarfine. En alia loko oni konstruos ankrojn por 35 000-tonela ŝipo. Mi rigardis en direkto montrita de li per fingro kaj vidis vastegan maron brilanta samkiel lampoj de sennombraj familioj. Mi imagis al mi la estontan havenurbon, de kie Tangshan iros al la mondo. ■

# MALGRANDAJ HIDROELEKT


Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LI CHUNGENG




Parto de fabriko de granitaj platoj

En la Gongcheng-a Porcelanaĵa Fabriko



Hemianshi-elektrejo







# REJOJ EN MONTVILAĜOJ



En la zipa fabriko de Cenxi funkciigata per ĉina kaj alilanda kapitalo

Balo de kamparanoj



**E**N Ĉinio vivas 1.1 miliardoj da loĝantoj, el kiuj 80% loĝas en la kamparo, tial garantii elektran liveradon al ĝi estas unu el la gravaj kondiĉoj por la sinkrona disvolviĝo de la urba kaj kampara ekonomio kaj plibonigi de la vivo de la kamparanoj.

Nun liveras elektron al la ĉina kamparo ĉefe du fontoj, t.e., grandaj elektrotretoj de la ŝtato kaj malgrandaj hidroelektrejoj de gubernioj. Ĉinio estas vastega kaj la ekonomia disvolviĝo malekvilibra, tial liverado de elektro al la kamparo sole per grandaj elektrotretoj estas malŝparema kaj nefarebla. Ĝuste pro tio Ĉinio alprenis du rimedojn por solvi tiun ĉi problemon. Antaŭ nelonge mi vidis malgrandajn hidroelektrejojn dissemittajn en vilaĝoj de orienta Guangxi, kiuj ludas gravan rolon en la elektroliverado al la kamparo. La tieaj kamparanoj nomas ilin perloj de montvilaĝoj.

## **ŜLOSILO DE LA EKONOMIA DISVOLVIĜO**

En la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono mi vizitis unue la gubernion Cenxi.

Cenxi situas ĉe la limo inter Guangdong kaj Guangxi. Tie regas subtropika musona klimato, kaj la meznombra jara pluvokvanto estas 1 400 mm. En la gubernio ondas montoj kaj fluas 30 grandaj kaj malgrandaj riveroj. La rezervo de hidraŭlikaj riĉfontoj estas 130 000 kilovattoj. La loko riĉas je granito, kalkoŝtono kaj baŭksito. La rezervo de granito estas 1.3 miliardoj da kubmetroj. Nun ĉiujare oni ekspluatas dekmilon da kubmetroj. Antaŭe la loĝantoj elhakis ŝtonojn kaj faris kalkon, tamen pro manko de karbo, elektro kaj petrolo, oni uzis nur brullignon por tion fari kaj elhakis ŝtonojn per pioĉo. Kompreneble, la profito estis ege malgranda. En 1985 en la najbara gubernio Luoding, Guangdong-provinco, la poreksporta produktado disvolviĝis rapide, dank' al la pordomalferma politiko, dume en Cenxi mankis entreprenoj destini-

taj por eksportado. Poste, ili invitis alilandan komerciston, kiu tamen demandis antaŭ ĉio: "Ĉu vi havas elektron?"

Elektro jam fariĝis ŝlosilo por la ekonomia disvolviĝo de la gubernio Cenxi. En la sekvantaj jaroj sin apogante sur la propraj fortoj kaj helpate de la materia kaj financa subteno de la registaro, loĝantoj de Cenxi konstruis en 825 lokoj malgrandajn hidroelektrejojn kun 877 generatoroj, kiuj povas produkti 100 milionojn da kWh da elektro ĉiujare. Ĉiu loĝanto uzas meznombre pli ol 200 kWh da elektro jare, kiuj atingis la normon de elektrizo por la tuta kamparo de Ĉinio en la primara fazo.

Dank' al la konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj, granito, kalkoŝtono, baŭksito, zinko, oro, arĝento kaj aliaj riĉaĵoj, longe dormantaj sub la tero, kaj natura rezino, longano (*Euphoria longan*), cinamo kaj ilicio produktitaj sur montoj tuj donis ekonomian profiton. Venis tien unuj post aliaj komercistoj el Usono, Filipinoj, Singapuro, Danlando, Tajlando, Japanio, Sud-Koreio, Hongkong, Aŭmen kaj Taiwan. Oni interesiĝas precipe pri la malhelruĝa granito produktita en Cenxi. Oni nomas ĝin Cenxi-a granito pro ĝiaj freŝa koloro kaj bonorde vicigantaj grajnoj. Ĝi povas rivali kun la plej debita granito hinda aŭ brazila en la mondo. Por elhaki graniton oni bezonas maŝinojn. Ŝtonsegaj maŝinoj kaj smirgomaŝinoj konsumas multe da elektro. Mi vidis en la Cenxi-a Ŝtonhaka Kompanio, kiel ŝtonsega maŝino kun bruo faras 2 cm dikajn platojn el ŝtonpeco 3 m longa, 1.5 m larĝa kaj 20 t peza. Ĝi bezonas 6 500 kWh da elektro en 72 horoj, tial sen sufiĉe da elektro oni ne povas plenumi la taskon. 3 japanaj komercistoj, montrante la ŝtonpecojn belkolorajn, acidimunajn kaj malmolajn, demandis: "Ĉu vi povus liveri al ni 360 000 kubmetrojn da tiaj ŝtonpecoj en 3 monatoj?" Kaj fine en malpli ol 3 monatoj Cenxi-a granito aperis sur la merkato de Tokio. Nun en la gubernio funkcias 6 fabrikoj de granitaj platoj investitaj

de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj 9 granitaj minejoj investitaj sole de aliaj landoj. Per avangardaj aŭtomataj ekipaĵoj ili ĉiujare produktas 480 000 kvadratajn metrojn da granitaj platoj, kiuj egalas al la totala produktokvanto de granitaj platoj de la tuta lando en 1988.

## **MALGRANDAJ HIDROELEKTREJOJ**

En pluveta tago mi venis al Hemianshi-elektrejo de Hexiang-gubernio ĉe la rivero Hejiang. Tie apikas montpintoj. Inter 2 montoj kuŝas granda digo masonita el granitaj platoj. Antaŭ la digo brilas akvo. La akvo senĉese falas sur la radojn de 4 hidroturbinoj de la elektrejo, kiu jare produktas 360 milionojn da kWh da elektro.

Estro de la elektrejo s-ro Fu Minggui diris al mi: "Iuj opinias, ke malgrandaj hidroelektrejoj estas bagatelaj. Kompreneble, juĝate laŭ ĝenerala ekonomia teorio la ekonomia profito de granda kaj mezgranda hidroelektrejoj estas multe pli granda ol tiu de la malgranda, sed fakte la malgranda estas investita de la loko mem kaj la ŝtato donas al ĝi nur malgrandan monhelpon. En la konstruado de malgranda hidroelektrejo oni povas plej efike uzi lokajn materiajn kaj homajn fortojn. Kaj plie, ĝi estas simpla kaj facile konstruebla, kun rimarkinda ekonomia profito." Ĉe Hejiang-rivero mi vidis la ŝtuparajn malgrandajn hidroelektrejojn Hemianshi, Linjiang, Yuntengdu kaj aliajn 9, kiuj jare produktas 450 milionojn da kWh da elektro. Tio estas granda miraklo.

Malgrandaj hidroelektrejoj estas utilaj precipe al la kamparanoj. Foje, survoje al alia elektrejo ĉe la rivero mi vizitis kelke da kamparanaj familioj en la distrikto Liantang. Mi vidis, ke la tieaj loĝantoj uzas elektron ne nur en irigaciado, prilaboro de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, sed ankaŭ en preparado de manĝaĵoj. En ĉiu hejmo funkcias elektraj aparatoj, kia televidilo. Kamparano Gao Xingyuan diris al mi, ke lia 14-membra familio konsumas 200



kWh da elektro ĉiumonate.

Antaŭ 3-4 jaroj, en la malproksimaj lokoj de Hexian-gubernio oni senŝeligis rizon per ligna bastono kaj lumigis la ĉambron per rezino. Nun tie la kamparanaj familioj, unuope aŭ plurope, konstruis sume 1 300 malgrandajn hidroelektrejojn donantajn elektron al la ĉiutaga vivo. Iuj generatoroj povas esti levitaj per unu mano. Tie ne vidiĝas digo, nek maŝindomo. Metite sur cementa subtenilo, la generatoro povas doni elektron en laĝeto aŭ rivereto kun flukvanto de 0.02-0.03 kubmetro sekunde kaj akvosurfaco alta 1-5 metrojn. Iu kamparano instalas malgrandan generatoron malantaŭ sia domo ĉe la rivereto. Kun ĝojo li diris al mi: "Antaŭe mi pensis, ke nur inĝenieroj kaj teknikistoj povas manipuli generatoron, sed nun, ankaŭ mi kampulo scias, kiel manipuli ĝin."


## SINTEZA UTILIGO

Samkiel en aliaj lokoj de Ĉinio, ankaŭ en la orienta Guangxi oni konstruas malgrandajn hidroelektrejojn ĉe akvofluo aŭ ĉe digo. Malgranda hidroelektrejo ĉe akvofluo estas simpla kaj malmultekosta. Konstruante akvokondukan kanalon ĉe la kruta deklivo aŭ kurbiĝo de rivero, oni povas produkti elektron per generatoro, tamen tiamaniere la akva utiligebleco estas malgranda kaj la elektrejo funkcias influate de la akvokvanto de rivero. Konstrui elektrejon ĉe digo estas malsimple, tamen, dank' al reguligo far la akvokonservejo, la akva utiligebleco estas multe pli granda ol tiu de malgranda hidroelektrejo ĉe akvofluo kaj la akvokvanto estas garantiata ankaŭ en la trosekeca periodo kaj rezulte de tio la sinteza profito estas dezirata. En la gubernio Lingchuan mi vizitis la akvomastroman konstruon Qingshitan, kiu ĉefe irigacias kampojn kaj produktas elektron. Ĝi estas ankaŭ uzata por bredi fiŝojn kaj servas kiel turisma loko.

Samkiel la elektrejo Hemianshi, ankaŭ la elektrejo Qingshitan konsistas el digo, akvokonservejo, kanalo por malhelpi superakvegon, subtera generatora domo, akvokon-

duka kanalo kaj aliaj. La akvokonservejo povas enteni 600 milionojn da kubmetroj da akvo.

En iu bela tago mi rigardis tiun artefaritan lagon en motorboato. La bela kaj kvietaj akvokonservejo jen larĝiĝis, jen mallarĝiĝis. Antaŭ nia boato aperis alta monto, kaj mi pensis, ke eble ni estas ĉe ekstremo de la lago, sed atinginte la montpiedon, oni turnis la pruon en alia direkto kaj antaŭ miaj okuloj aperis vasta akvaro. En tiu bela pejzaĝo mia laco tuj malaperis. Mia akompananto de la elektrejo s-ro Huang diris al mi, ke ilia elektrejo havas ĉefe 2 taskojn, krom produkti elektron: Unue, konduki akvon de tiu akvokonservejo al la mondfama rivero Lijiang, kiam mankas akvo al ĝi; due, irigacii 29 000 hektarojn da kampoj en la gubernioj Lingchuan, Lingui kaj antaŭurbo de la vidindejo Guilin per grandaj kaj malgrandaj kanaloj kun totala longo de 929 km. Oni diris al mi, ke antaŭ la konstruado de la akvokonservejo tie la kampoj estis ofte atakataj de trosekeco kaj inundo kaj la produktokvanto de greno ne estis garantiata, sed post la konstruado de la akvokonservejo oni akiris riĉan rikolton en 7 sinsekvaj jaroj. En 1990 ĉiu hektaro da kampoj donis meznombro 7 875 kg da greno, 2-3-oble pli multe ol tiu antaŭ la konstruado de la akvokonservejo. Tie oni plantis orangarbojn, kaŝtandarbojn, prunardojn kaj aliajn fruktardojn, dank' al tio la



Malgranda hidroelektrejo en konstruado

ekologia medio multe pliboniĝis.

En Guangxi mi vidis plurajn malgrandajn hidroelektrejojn en konstruado, el kiuj la elektrejo Tianhu en la gubernio Quanzhou multe interesis min. Laŭ la plano la akvosurfaco altas 1 074 metrojn. La tiel alta niveldiferenco de akvo estas malofte vidata eĉ en la mondo. Post sia finkonstruiĝo ĉiujare la elektrejo donos 178 milionojn da kWh da elektro.

La malgrandaj hidroelektrejoj en la orienta Guangxi estas nur tre malgranda parto de tiuj en Ĉinio. Laŭ materialoj donitaj de la Akvoutiliga Ministerio de Ĉinio, nun funkcias 58 000 tiaj hidroelektrejoj, ĉiu kun kapacito de malpli ol 25 000 kilovattoj. Ili troviĝas en 1 500 gubernioj kaj la totala jara elektrokvanto estas 39.2 miliardoj da kWh. En 1985-1990, en Ĉinio aperis 109 gubernioj, kie ĉiu homo konsumis meznombro 200 kWh da elektro en jaro. En 1991-1995, en Ĉinio aperos aliaj 200 tiaj gubernioj. ■

# Brigitte Frank-Böhringer

de CHEN YUAN

**M**ARTE de 1989 mi loĝis en la Instituto pri Kibernetiko en Paderborn najbare de la hejmo de s-ino Frank-Böhringer kaj estis bone prizorgata de ŝi. Neatendite, post unu jaro ŝi forpasis en sia nur 54-jara aĝo.

Ŝi naskiĝis antaŭvespere de la nazia reĝimo. Nur en 1974 ŝi eklernis Esperanton kune kun siaj familianoj (prof. Frank kaj la gefiloj). De tiam ŝi estis senlaca batalantino, kiu sin dediĉis al Esperanto kaj la scienca afero de Esperanto. Ŝi sindoneme laboris por la Instituto pri Kibernetiko en Paderborn kaj la Akademio Internacia

de la Sciencoj (AIS) San Marino kaj por la gazeto "Human-kibernetiko" eldonata en pluraj lingvoj.

Ŝi estis bona edzino kaj patrino. Ŝi bonege prizorgis siajn edzon kaj gefilojn. Ŝi mem ŝoforis por veturigi gastojn kaj iafoje la edzon, por porti librojn al poŝtoŝeĉejo kaj fari aĉetojn. Ŝi diris al mi, ke ŝi ne lasis sian edzon ŝofori, ĉar li ĉiam absorbiĝis en sia fako kaj ŝi timis, ke lin trafos akcidento. Foje prof. Frank montris al mi sian ŝoforlegitimilon, sur kiu estas lia foto farita en lia juneco. Li diris, ke li tre malofte ŝoforis.

S-ino Frank-Böhringer estis la plej entuziasma subtenanto de lia

afero. Ŝi prenis sur sin preskaŭ ĉiujn laborojn — tajpado, kopiado, pakado kaj sendo de poŝtaĵoj, redaktado, skribado de leteroj... En marto 1989, kiam kunvenis en Paderborn la senato de AIS, ŝi tagnokte laboris por eldoni la Adresaron de AIS. Por havigi al ni la adresaron kun 261 paĝoj, ŝi iradis inter la presejo kaj instituto. Kelkajn horojn antaŭ mia forlaso de la urbo ŝi enmanigis al mi la adresaron ĵus presitan.

Ofte ŝi gastigis gesamideanojn kaj ili sentis sin kiel hejme. Posttagmeze de iu tago de marto 1989 — ĉiam, kiam mi estis libera — ŝi telefonis al mi: "Kara amiko, eble vi devas ripozi. Mi jam preparis teon. Ĉu vi povas veni por trinki kune kun ni." Tuj poste mi iris al ŝia hejmo laŭ ŝtuparo, kiun ni ŝerce nomis "sekreta vojo". Iajoje vespere mi aŭdis ŝian voĉon en telefono: "Kara profesoro! Ĉu via stomako murmuris? Ĉu vi ne volas pleniĝi ĝin kune kun ni?" Ŝiaj vortoj estis humuraj kaj familiaraj. Ŝi laboris tage kaj nokte. La scienca kaj Esperanta laboroj estas farataj de malriĉuloj. Ŝia familio ne estis riĉa, tamen ŝi estis gastama kaj senlaca en lernado kaj instruado. En tiuj jaroj ŝi estis tre okupita, tamen ĉiufoje, kiam mi vizitis ŝian urbon, ŝi certe foruzis unu tagon por veturigi min por turisma vojaĝo, vizito de la akvofonto de la urbo kaj aĉeto de mikrokomputila aranĝaĵo en tiu aŭ alia vendejo. Ŝia spirito kortuŝis multajn personojn, kaj per siaj agoj ŝi gajnis multajn amikojn okcidentajn kaj orientajn.

Ŝia tuta familio partoprenis la 71-an UK en Pekino kaj tuj poste

S-ino Brigitte Frank-Böhringer (la tria de dekstre), ŝiaj familianoj kaj ĉinaj esperantistoj en 1985





la internacian simpozion pri socia lingvo en Tokio. Tiam ŝi loĝis en hotelo de japana stilo por sperti la vivon de japanoj. Mi vizitis ŝin kaj ŝiajn familianojn en la hotelo. Ili ĉiuj portis kimonojn, kun gajaj koloroj. Ŝi estis tiel grandanima, tiel serena, ŝi brakumis la homaron. Sed kial Dio tiel frue revokis ŝin? Ŝia lasta vorto estas: "Nun mia fundamenta laboro devas esti farata de vi." La laboro estas eldonado de la periodaĵo "Human-kibernetiko", kiu aĝas 31 jarojn. Ŝi lernis kaj uzis Esperanton kaj fandis la idealon de Esperanto kun sia tuta laboro kaj la

homaranismon de Zamenhof kun sia ĉiutaga vivo. Ŝi mem estas transformiĝinto de esperanto. En la komenco de la nekrologo legiĝas funebra poemo de R. M. Rilke. La unuaj du strofoj de lia signifop profunda poemo vidigis al mi ĉiam memorindan Esperantan batalantanon:

*Nenion scias ni pri tiu pas'.*

*Ĝi nin rifuzas. Mankas la motiv',*

*Ke brodu ni sur de la mort' kanoas'*

*Malamon kaj amegon pro la viv'.*

*Tragika plendo el mortmaska buŝ'!*  
*Ni ĉie ludas niajn Terajn rolojn,*  
*Kaj dum ni zorgas danci farandolojn,*  
*La mort' minacas per ponarda puŝ'!*

R. M. Rilke estis germana lirika poeto tre amata de la popolo. La strofoj estas tiom tristaj. Mi legis ankaŭ la lastajn du versojn de la poemo:

*Ke ni momente plenaj de pasio*  
*La vivon ludas, ne pri laŭd' pensante.*

## REZOLUCIO

La partoprenantoj de la XII-a ĜENERALA KONFERENCO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM) okazinta de la 3-a ĝis la 5-a de majo 1991 en Bydgoszcz, Pollando,

- \* PRITRAKTINTE la aktualan internacian situacion koncerne pacon, solidarecon kaj kooperadon, la bazajn principojn de sia movado,
- \* KONSTATANTE, ke mondpaco ne nur signifas mondon sen milito, sed mondon en kiu regas ankaŭ justo, sekureco kaj kultura florado.
- \* KONSTATANTE, ke tio implikas ankaŭ la ekologian temaron,
- \* KONSTATANTE, ke la regula aperado de la revuo "PACO" lastatempe stagnis,
- \* REKOMENDAS reorganizi kaj certigi la aperadon de la revuo, kiel libera forumo de opini-interŝanĝoj.
- \* REKOMENDAS ĉiujn individuajn membrojn, laŭeble, partopreni kaj subteni naciajn kaj internaciajn porpacajn kaj ekologiajn movadojn por la protekto de la natura kaj kultura medio de la homaro.

El la bulteno n° 159 de MEM "La pacaktivulo"

## Granda honoro

La XII-a Ĝenerala Konferenco de MEM konfirmis la proponon de la sekretariato atribui la diplomon kaj la honorinsignon de MEM al la Buroo de Esperanto-Turismo (Bydgoszcz), al la redakcio de "El Popola Ĉinio" pro ilia porpaca kaj poramikeca laboro, al samideanoj Victor Demunck kaj Valter Tholet pro ilia teknika helpado al la eldonado de "La Pacaktivulo".

El la bulteno n° 159 de MEM "La pacaktivulo"

## Nova servo por EPC-legantoj

La Belga peranto, nome ELDONEJO & LIBREJO SONORILO vzw, Doornstraat 22, B- 2610 Wilrijk, tel. 03/827.24.05. anoncas ke la legantoj de nia revuo El Popola Ĉinio nun povas mendi siajn Esperantajn librojn kaj la revuojn kaj pagi ekde nun per kreditkarto "VISA". Se vi volas pagi per VISA, bv. menci i tiam la numeron de via VISA kreditkarto. Vi povas pagi ankaŭ je nia konto ĉe UEA: snrl-v, ĉe banko BBL: 320-0342460-23 kaj je nia poŝta ĝirkonto 000-0152140-44.

# Vizito en Francio

**O**KTOBRON 1990, laŭ invito de Esperanta organizo de Francio, mi kaj s-ro Zhang Yiqing, kaligrafo kaj estro de la Kultura Buroo de Huangshan, prelegis en Esperanto por konigi al francaj amikoj la ĉinajn kulturon, pejzaĝojn kaj kaligrafion. Pro tio ni postlasis niajn piedsignojn en Parizo, Liono kaj aliaj 12 francaj urboj.

Unu tagon post kiam ni atingis Parizon, ni vizitis la Unuiĝon Francan por Esperanto norde de Sejno, akompanate de s-ro Cavallive, kaj renkontiĝis kun esperantistoj el Norvegio, Japanio, Portugalio, Bulgario, Germanio, Sovetunio kaj Britio. En aplaŭdado s-ro Zhang donacis al la Unuiĝo Franca por Esperanto sian improvizitan kaligrafiaĵon en la ĉina lingvo, kiu signifas "Esperanto — la suno en la lingvoj".

Tion aŭdinte, Radio Libero de Francio sendis inviti nin al sia disaŭdiga laborejo, kie oni intervjuis nin unu horon por raporti pri nia aktivado. Post elsendo de la raportaĵo ni ricevis pli ol 20 leterojn kaj telegramojn por inviti

nin, tiel ke ni aldonis ses urbojn al nia plano (ni planis viziti nur ok urbojn).

Kulturo ne konas landlimon. Ĉie kien ni venis, multaj francoj kun granda intereso kaj amikeco al Ĉinio partoprenis en nia kultur-interŝanĝa aktivado. Dank' al EPC iuj francaj samideanoj jam konis la ĉinan kaligrafion kaj aliaj eĉ studis ĝin. Ili invitis siajn amikojn kaj iliajn familianojn viziti ekspozicion pri la ĉina kaligrafio kaj aŭskulti nian prelegon. Iuj eĉ en ĉinaj vestoj venis al la ekspozicio, kun libroj kaj gazetoj pri Ĉinio por montrado. Ili volonte faris eksplikadon kaj interpretadon por konigi Ĉinion al siaj samlandanoj.

En la urbo Osny okcidente de Parizo oni unuafoje organizis tian aktivadon por konigi la ĉinan kulturon. Tiutage okazis ankaŭ jara foiro de la urbo. Matene la kvietaj stratoj tuj fariĝis movoplenaj. Oni starigis standojn sur ĉiuj stratoj. Niaj ekspozicio kaj prelego estis aranĝitaj en la kultura domo de la urbo. Por la aktivado oni faris propagandon ĉe movoplena strato kaj algluis afiŝojn ĉe la pordoj de vendejoj kaj sur ĉefaj stratoj. Senĉese

venis vizitantoj, kiuj aŭ longe staris por ĝui ĉinajn kaligrafiaĵojn aŭ absorbite televidis ĉinajn pejzaĝojn. La aktivado daŭris ĝis la sepa horo vespere.

Por bonvenigi nin, la liceo de Condorcet en suda Francio senprecedence anticipis la lecionojn de la venonta semestro pri la kulturo, geografio kaj historio de Ĉinio kaj invitis nin prelegi al pli ol 300 lernantoj. Ili diris, ke la prelego estas tre interesa kaj Ĉinio estas bela lando, kaj esprimis sian deziron viziti Ĉinion.

Mi trovis, ke Esperanto interesis multajn francojn. Ĉie, kie ni estis, francoj demandis, kian lingvon ni parolis. Francaj esperantistoj ĝoje diris al ni: "Vi alportis al ni ne nur la brilan ĉinan kulturon, sed ankaŭ la Esperantan vivforton." Aŭskultinte mian konigon pri la disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio, la urbestro de Boissy Sous St. Yon tuj promesis al la lokaj esperantistoj: "Por subteni la pacan internacian lingvon, ni favoros disvolvon de via Esperanta aktivado per salonoj de la urbo-domo." En la kolegio de la Universitato St-vrain mi diris en la prele-



Kaligrafo Zhang Yiqing (la dua de dekstre) kaj lia kaligrafiaĵo kun la signifo "Eterna amikeco"





S-ro Wang Xigeng (la dua de maldekstre) kaj francaj esperantistoj en vespermanĝo

go, ke ni ne parolas la francan lingvon nek la anglan kaj dum nia vojaĝo en Francio nur Esperanto helpas nin. Tuj post mia prelego deko da lernantoj sin anoncis al sia instruisto por lerni Esperanton. Tuj kiam ni atingis Lionon, ĝia televida stacio raportis pri la televida kurso de Esperanto funkciigata de la Centra Televido de Ĉinio, telesendis parton de la filmo pri la instruado kaj konigis, kiel la ĉina registaro alte taksas kaj subtenas la Esperantan laboron.

En Francio multaj francaj esperantistoj varme akceptis kaj helpis nin, kio montris la sinceran amikecon de la franca popolo al la ĉina popolo.

La pli-ol-80-jaraj geedzoj Lantaigne korespondis kun mi ĉ. dek jarojn. Ili multe kuraĝigis kaj helpis min en mia lernado de Esperanto. Informiĝinte, ke ni estis vojaĝontaj de Clermont-Ferrand al Nimes, ili malgraŭ maljuneco kaj pluvo trajne veturis de Montpllier al la stacio de Nimes, tie atendis du horojn por bonvenigi nin kaj hejmen revenis vespere. Ni gaje pasigis du tagojn kune kun ili.

Kelkfoje en la ekspozicio mi vidis virinon en ĉina robo. Post demando mi eksciis, ke ŝi estas s-ino Zorka Enizan, bone konata de ĉinaj esperantistoj. Ŝi kaj ŝia edzo, s-ro Ludoviko Enizan, multfoje vizitis Ĉinion. S-ino Zorka parolas ankaŭ la ĉinan lingvon kaj presis sur sia vizitkarto kvar ĉinajn ideografiajn signifantajn "Ĉinio en mia koro" por esprimi sian profundan amon al Ĉinio. Ŝia edzo Ludoviko estas aktiva esperantisto, multfoje vizitis Ĉinion kaj ofte publikigis en francaj ĵurnaloj artikolojn pri Ĉinio. Trifoje ili aŭte veturis centojn da kilometroj por aŭskulti mian prelegon kaj viziti nian ekspozicion kaj gastame akceptis nin en sia hejmo. Ili estis la plej aktivaj helpantoj de niaj aktivadoj.

Nia lasta aktivado okazis en la 5-a de novembro en la urbo Issy-Les-Moulineaux. Ĉiuj preparaj laboroj estis farataj ĉefe de s-ino Jean Rosiu. La 3-an de novembro, kiam ŝi hejmorevenis post pasigo de ferioj, trafika akcidento trafis ŝin. Multaj lokoj de ŝia spino estis vunditaj kaj ŝi svenis unu tagon en la lito de la hospitalo. Tuj kiam ŝi

rekonsciigis, ŝi telefonis al siaj superulo kaj kolegoj, ke ili daŭrigu ŝian neplenumitajn preparajn laborojn. Sekve la aktivado povis sukcese okazi. Ŝia ago profunde kortuŝis nin. Ni kore deziras, ke ŝi resaniĝu kiel eble plej baldaŭ.

En 38 tagoj en francaj lernejoj, fabrikoj kaj kulturaj societoj ni 14-foje okazigis ekspozicion pri la ĉina kaligrafio kaj faris prelegon, kiujn ĉeestis francoj ĉ. 20 000-homfoje. Kvankam la ĉi-foja kultura interŝanĝo okazis inter la popoloj, tamen la urbestroj de Osny, Boiss Sous St. Yon kaj Dechines akceptis nin kaj kvin magistratoj sendis kulturajn oficiojn partopreni en niaj aktivadoj. Krome, dek francaj ĵurnaloj kaj tri francaj radio- kaj televidstacioj raportis pri niaj aktivadoj. La Unuiĝo Franca por Esperanto kaj televida stacio intervjuis nin kaj filmis niajn aktivadojn.

La 8-an de novembro en la flughaveno de De Gaulle ni adiaŭis niajn francajn amikojn. Ni diris "ĝis revido", ni kore dankis la francan popolon kaj forportis ĝian profundan amikecon. ■

# PROSPERU FLOROJ DE LA SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

**A**RO da scienc-teknikaj fruktoj estas aplikata en la nacia ekonomio kaj fariĝis produktaj fortoj. Jen unu el la kialoj de rapida progreso de la ĉina ekonomio en la lastaj jaroj. Estas strikte ligitaj kun la popularigo de sciencoj kaj teknikoj ĉiuj atingoj de la nacia ekonomio, kiaj 400 milionoj da tunoj da greno produktitaj en unu jaro, finkonstruiĝo de la norda ventoŝirma forsta zono, prospektorado, ekspluatado, alta kaj stabila produktado de la Olekampo Daqing kaj aliaj olekampo kaj starigo de bazlokoj de legoma kaj vianda produktado. Ili estas kristaliĝo de la laboro de ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj.

Jam forpasis la tempo, kiam la ĉinaj scienc-teknikaj atingoj estis nur specimenoj, eksponaĵoj kaj donacoj. Nun pere de la teknika merkato en la lando multaj scienc-teknikaj atingoj estas transdonitaj al produktado. "La Plano Torĉo"

por disvolvi altajn kaj novajn teknikojn kaj "La Plano Fajrero" por popularigi teknikojn en la ĉina kamparo certgrade akcelas la aplikadon de la scienc-teknikaj atingoj, precipe "La Populariga Plano de Gravaj Scienc-teknikaj Atingoj de Ĉinio" multe aplikigis la avangardajn scienc-teknikajn atingojn.

Surtera plasta membrano estas favora por plialtigi temperaturon de la tersurfaco kaj reteni akvon de la tero. En 1979 la Agrikultura Ministerio de Ĉinio de eksterlande enkondukis la teknikon kaj faris eksperimentadon en diversaj lokoj. En 1982 la tekniko estis enmetita en la liston de gravaj popularigendaj teknikoj de la ŝtato. En la sama jaro ĝi estis aplikata sur kampoj de 118 000 hektaroj kaj en 1990 la areo atingis 3 330 000 hektarojn. La rapida populariĝo de la tekniko tra la lando ludis gravan rolon en plibonigo de la ĉina agrikultura produktado.

Jam en la 50-aj jaroj Ĉinio komencis eksperimentadon pri bredo de salikokoj, sed la produktokvanto estis tre malalta. La kialo kuŝis en tio, ke oni ne posedis artefaritan kovadon de salikokidoj kaj kaptis ilin en natura maro. Post 20-jara esplorado oni sciis artefaritan kovadon de salikokidoj en 1981 kaj la produktokvanto atingis 1 470 milionojn da salikokoj, t.e. 40-oble pli multe ol tiu en 1979. La tekniko de artefarita kovado de salikokidoj rapide aplikigis en la produktado, kio multe levis la produktokvanton de salikokoj. En 1988 la akvosurfaco por kulturado de salikokoj atingis 160 000 hektarojn kun produktokvanto de 200 000 tunoj da salikokoj, el kiuj 50 000 tunoj estis eksportitaj. Multaj malprofundaĵoj fariĝis salikokaj kulturejoj.

Kun disvolviĝo de kemisterka produktado de Ĉinio aperis en la lando grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj de sinteza amoniako. En la lastaj jaroj la es-


Plasta membrano ludas gravan rolon en la agrokulturo de Ĉinio.



Izotopa tekniko vaste uzata







plorado de kataliziloj por sinteza amoniako kaj ilia popularigo akiris grandajn sukcesojn. La katalizilo B-112 produktita de la Katalizila Fabriko sub la Nankina Kemiindustria Kompanio sin karakterizas per kompare malalta temperaturo en katalizado kaj forta rezisteco al sulfuro. Tiu katalizilo estas uzata en pli ol 200 sintezamoniakaj fabrikoj de 17 provincoj en la lando, kio povas ŝparigi al la fabrikoj 5 milionojn da tunoj da vaporo, 5 000 000 kWh da elektro, kiuj egalas al miliono da tunoj da norma karbo.

Iuj altteknikaj produktaĵoj, kiaj izotopoj, estas vaste uzataj en Ĉinio. Jam en la 50-aj jaroj la Ĉina Atom-energia Instituto elfaris kelkajn specojn de izotopoj. Nun la kobalton-60, radia fonto en kuracado, brulalarma sistemo americio-241 kaj pluraj pormanĝaj radiaj medikamentoj kaj nepormanĝaj radiaj analizaj medikamentaj skatoloj jam atingis avangardan nivelon de la mondo. Interalie, la medicinaj izotopoj estas vaste aplikataj en kliniko. Nun 2 000 hospitaloj uzas izotopojn en kuracado. En 1990 la medicinaj izotopoj kaj iliaj produktaĵoj akiris grandan socian kaj ekonomian efikon. Izotopoj ankaŭ estas bone uzataj en agrikulturo. En elkulturado de novaj specioj de plantoj per radiado Ĉinio estas avangarda en la mondo.

Modela plato estas nemankigebla por fari ferbetonajn objektojn. El la tuta elspezo por fari ferbetonajn konstruaĵojn tiu de modelaj platoj konsistigas trionon. Ĝenerale dirite, ĉiujare Ĉinio bezonas pli

ol 10 milionojn da kubmetroj da ligno sole en la fundamenta konstruado. Komence de la 80-aj jaroj la Arkitektura Instituto sub la Metalurgia Ministerio de Ĉinio elfaris feran modelan platon, kiu rapide populariĝis tra la lando. En la lastaj dek jaroj fondiĝis 200 fabrikoj de feraj modelaj platoj kaj aliaj pecoj. En la fino de 1990 la produktitaj feraj modelaj platoj jam atingis 28 milionojn da kvadrataj metroj, kiuj anstataŭis 19 110 000 kubmetrojn da ligno.

Laŭ la statistikoj de 42 ministrioj kaj komisionoj sub la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kaj tiuj de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj oni ekspertizis sume 33 091 scienc-teknikajn atingojn en 1990, el kiuj 26 829 estis gravaj. El 23 297 teknikaj atingoj 19 354 jam aplikis en la produktado, kiuj ekdonis ekonomian efikon. Sed la longatempa disigiteco de scienc-teknikoj kaj produktado ne plene solviĝis kaj tial el la 20 000 gravaj atingoj inventitaj ĉiujare sufiĉe granda parto ne aplikis en la produktado. Kaj aro da atingoj, bonefikaj kaj profitodonaj, pruvitaj en la produktado, ankoraŭ ne populariĝas en koncernaj kampoj. Por pliiĝi la popularigon de scienc-teknikaj atingoj en somero ĉi-jare okazis en Pekino la unua tutlanda konferenco de popularigo de la scienc-teknikaj atingoj.

La sciencistoj kaj teknikistoj de diversaj lokoj de la lando diskutis pri la metodoj de popularigo de scienc-teknikaj atingoj kaj venis al konkludo, ke oni povas krei bonan medion por la popularigo de scienc-teknikaj atingoj nur per leĝaj rimedoj. La ĉeestantoj konigis siajn spertojn en la popularigo.

En la konferenco oni montris,



En rikolto de bredataj salikokoj

ke estas necese per ĵurnalismaj vojoj, kiaj radiodisaŭdigo, televido kaj gazetoj, kiel eble plej efike diskonigi la scienc-teknikajn atingojn. "Plena Kolekto de Ĉinaj Teknikaj Atingoj" aperinta antaŭ tri jaroj enhavas 20 000 elstarajn atingojn en ĉiu jaro. La libro estas bonvena kaj nun jam eldoniĝis 60 volumoj, kun 60 000 scienc-teknikaj atingoj. La Unua Aŭtofabriko de Ĉinio prenas ĝin kiel ĉefan fonton de informoj por plibonigi la kvaliton de produktaĵoj, kreskigi produktokvanton kaj redukti la produktokoston. La fabriko fosas en la libro por trovi taŭgajn teknikojn. La aplikado de "la teorio de strukturo de Martens en malaltkarbona ŝtalo" en praktiko ĉiujare ŝparigas al la fabriko 2 milionojn da janoj.

Popularigo de scienc-teknikaj atingoj estas ŝlosilo por kombini scienccon kun ekonomio kaj grava kanalo de transformiĝo de sciencoj kaj teknikoj en sociajn produktajn fortojn. En la konferenco oni aprobis la Dek-jaran Planon pri Popularigo de Scienc-teknikaj Atingoj ellaboritan de la Ŝtata Komisiono de Sciencoj kaj Teknikoj de Ĉinio. Espereble, ke por ĉiuj scienc-teknikaj atingoj estas brila perspektivo kaj ĉiu el ili faros sian kontribuon al la nacia ekonomio de Ĉinio. ■

# En fermo de E-kurso

Teksto de LU CHUANBIAO

Fotoj de YAN JIN kaj LIU SIGONG


En la somero de la kuranta jaro la 14 membroj de la E-kurso de la Pekina Disaŭdiga Instituto finis sian dujaran lernadon per bonaj notoj.

La 28-an de junio okazis la nomita fermo. Ĝin ĉeestis pekinaj esperantistoj, membroj de la societo "Amikoj de Esperanto" kaj respondeculoj de koncernaj fakoj, sume pli ol 100 personoj. Inter ili estis Luo Jun, vicestro de la societo "Amikoj de Esperanto", Chen Yuan, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Chang Zhenzheng, estro de la Pekina Disaŭdiga Instituto, kaj Chai Zemin, honora konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio. En la fermo veteranaj esperantistoj varme gratulis ilin pro ilia sukceso. Per siaj travivaĵoj ili parolis pri la grava signifo de la internacia helpa lingvo Esperanto en la internacia interŝanĝo kaj la afero de paco, amikeco kaj progreso. Ili kuraĝigis la novebakitajn esperantistojn al plua lernado de la lingvo.

Por danki la veteranajn esperantistojn kaj instruistojn la kursanoj prezentis en Esperanto paragrafon de la fama ĉina dramo "La Sunleviĝo".

La junaj esperantistoj nun laboras en ĈEL, EPC, Radio Pekino kaj la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio.

Partoprenantoj de la fermo



Veteranaj esperantistoj en la fermo





En la Fermo de E-kurso de PDI



Sceno el la dramo "La Sunleviĝo"



Veteranaj esperantistoj kaj kursanoj en la fermo

# Refoje viziti Ĉinion post 12 jaroj

*En 1980, fama usona magiista familio de Mark Wilson invitive vizitis Ĉinion por monata turneo. Tio estas konsiderita kiel interesa rakonto en kultura interŝanĝo de Ĉinio kaj Usono. 12 jaroj pasis, ili refoje venis Ĉinion kaj turneis en Pekino kaj aliaj lokoj. Kiel antaŭe ili estis multe ŝatataj de ĉinaj spektantoj. Mike Wilson, membro de tiu magiista familio, rememoris en sia artikolo la turneon en Ĉinio antaŭ 12 jaroj, priskribante kulturajn interŝanĝojn inter Ĉinio kaj Usono de post tiam.*

**La Red.**

**A**NTAŬ 12 jaroj, mi havis plezuron akompani mian magiistan familion al Ĉinio por turneo. Tio estis rigardata kiel grava evento en la historio de la ĉina kaj usona kultura interŝanĝo. En 1980, invitive de la Kultura Ministerio de Ĉinio, Mark, Nanny, Greg Wilson kaj aliaj 17 magiistoj kaj laborantoj, akompanataj de mi, faris grandskalan turneon en Ĉinio, lando la plej multhoma sur la Tero. Ni ludis magiaĵojn ne nur en la plej bonaj teatroj de Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉinio, sed ankaŭ en fabrikoj, vilaĝoj kaj lernejoj. La turneo komenciĝis en Pekino kaj finiĝis en Ŝanhajo.

Ni estis intime akceptataj ĉie, kie ni estis, kaj ĉiuj teatroj, en kiuj ni faris prezentadon, estis plenaj de spektatoroj. La improvizitaj ludoj de Mark kaj Greg en fabrikoj kaj parkoj allogis milojn da spektantoj. Laŭ mia scio, en la 40 jaroj neniam okazis, ke alilandaj ĵonglistoj tiel libere faris prezentadon en la mistera "Centra Imperio". En Nankino, iu maljunulo venis en la kulisson post nia prezentado kaj diris al mi: "Ni longe atendis vin."

Antaŭe malofte estis en Ĉinio tiel ekscita kaj energia prezentado. Niaj muzikoj kun rapida ritmo, brilaj fonoj, diverskoloraj rekvizitoj, diversspecaj magiaĵoj kaj dancistoj en tre mallongaj vestoj


multe larĝigis la vidkampon de la spektantoj, kiuj sopiras al alilandaj artaĵoj kun novaj kaj malsamaj stiloj. Kaj krome, la Centra Televido, la plej granda en Ĉinio, filmis ĉiujn niajn programerojn por elsendi al la tuta lando.

Ĉinoj multe atentis la unuafoje aperantan aferon. Mark kaj Greg estis sendube la unuaj alilandaj ĵonglistoj, kiuj faris prezentadon al la spektantoj de la nova Ĉinio. Mia ĉina amiko informis al mi, ke Mark kaj Greg estis por ĉinoj du famaj

fremdlandaj magiistoj, ĉar multaj ĉinoj jam spektis ilian prezentadon aŭ en teatro aŭ per televido.

Dank' al la turneo en Ĉinio, ni havis ŝancon propraokule rigardi kiel ĉinoj laboras, vivas kaj sin amuzas. Ni ankaŭ spektis multajn brilajn ludojn de ĉinaj aktoroj, inkl. de pekinaj operoj, naciaj dancoj kaj muzikoj, kelkfoje ni eĉ aŭskultis humurajn dialogojn per radioaparato. Kompreneble, la plej brilaj estis la ĉinaj talentaj kaj mirindaj akrobataĵoj.

S-ro Mark Wilson prezentas en la Imperiestra Palaco de Pekino.





Nun Ĉinio havas pli ol 250 akrobatajn trupojn kun pli ol 25 000 akrobatoj. Ĉiuj provincoj kaj grandaj urboj havas siajn proprajn cirkojn kaj akrobatajn trupojn. Ni neniam vidis tiajn nekredoblajn atingojn de ĵonglado, tordiĝo, forto kaj ekvibrado. Ni tuj komprenis, ke Ĉinio havas multe da eksterordinaraj artistoj, nur aliaj landoj tion ne sciis dum multaj jaroj. Same kiel Ĉinio dum dekoj da jaroj ne konis la disvolviĝon de magia arto en aliaj landoj, ankaŭ ni tute ne konis la talentajn akrobataĵojn luditajn ĉiutage en Ĉinio.

Post kiam ni spektis tiujn mirindajn prezentadojn, naskiĝis en ni la ideo: La ĉinaj akrobataĵoj certe sukcesos en norda Ameriko.

En 2 jaroj ni faris multfoje intertraktadon kun la alia bordo de Pacifiko antaŭ kiam ni invitis la unuan ĉinan akrobatan trupon al Usono. En 1984, invitite de ni alvenis al Usono la unua Ĉina Akrobata Trupo el Pekino. Ĝi ludis ak-

robataĵojn en unu somero en amuzejo de Sesflaga Kompanio en New Jersey. Tio donis al ni ambaŭ ŝancon por reciproka kompreno kaj lernado. En Ĉinio la akrobata trupo kutime ludas 2 horojn vespere de mardo ĝis dimanĉo. Sed en usona amuzejo la afero estis tute alia. La spektantoj plejparte viglas tage kaj semajnfine. Por ke pli multaj spektantoj povu ĝui ĉinajn akrobataĵojn, la amuzejo aranĝis ĉiutage prezentadon po 4-5 fojoj, ĉiutage ĝi daŭris 30 minutojn. Tio signifas, ke ni ne bezonas normalan trupon el 60-80 akrobatoj, nek multajn helpantojn kaj 2-horan prezentadon. Ni bezonas lertan kaj kapablan trupon el 10-15 personoj.

Post longa diskutado, ni finfine konvinkis koncernajn ĉinajn funkciulojn, ke la akrobatoj povu ludi plurfoje ĉiutage, kaj dank' al la internacia prezentado en la amuzejo, koncernaj ĉinaj respondeculoj komprenis, kion ni bezonas kaj pro kio ni bezonas tion.

Prezentado en la Pekina Amuzejo



En solvo de la problemo, ke ĉinaj akrobatoj povas preni ĉinajn manĝaĵojn en Usono, ni fariĝis la unua internacia impresario, kiu invitas ĉinan kuiriston akompani la trupon eksterlanden. De post tiam, ĉiu ĉina trupo venis en Usonon kun sia propra kuiristo. Tio havas multajn avantaĝojn. Kelkfoje, la programistoj de televido povas ĝui, intervjuante la trupon, verajn ĉinajn pladojn.

En la pasintaj 8 jaroj, ni invitis al ni entute 19 akrobatajn teamojn el 350 gastoj el la Ĉina Popola Respubliko. Per serioj da brilaj prezentadoj, ili disvastigis mirindajn ĉinajn akrobataĵojn en ĉiuj ŝtatoj sur la usona kontinento. Pli ol 3.5 milionoj da spektantoj propraokule ĝuis la prezentadon.

En 1991, ni invitis 2 akrobatajn teamojn al Usono el Ŝanhajo kaj estas preparantaj kune kun la Ŝanhaja Agentejo de Kultura Interŝanĝo serion da programeroj titolitan "Parado de Dinastioj", kiu konsistos el akrobataĵoj, dancoj, pekina opero kaj naciaj muzikoj. Tio estos impona prezentado, kiel s-ro Herbert O. Fox, prezidanto de la Kolombia Administrejo, diris: "Tio estos la plej bona, plej brila, plej amuza kaj senprecedenca prezentado el Ĉinio!"

De post la turneo en Ĉinio en 1980, kvankam mi vizitis Ĉinion 44 fojojn, tamen miaj gepatroj kaj frato ne havis ŝancon refoje viziti ĝin. Nun la ŝanĝiĝoj de la ĉinaj amuzejoj ebligas al la familio de Wilson la refojan turneon en Ĉinio. Junie, Greg Wilson denove faris prezentadon en pekina amuzejo. Kvankam miaj gepatroj ne persone faris prezentadon, tamen ili ĉeestis la inaŭguron.

Kompreneble, daŭros nia longa kaj amika kunlaboro kun la ĉina popolo. Sendube, magio havas longan historion kaj Ĉinio estas ĝia hejmlando. Kvankam oni ne povas certigi, kiam aperis multaj magiaj teknikoj, tamen estas ĝenerale rekonita, ke ĝi naskiĝis en Ĉinio.

De multaj jaroj mi estas fiera pro tio, ke mia familio povis prezenti magiaĵojn en Oriento kaj mi kore deziras, ke la ĉina magio longe prosperu. ■

# En la antikva ĉefurbo Kaifeng

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LING YOUJUAN




Prezentado en la finkonstruiĝa soleno

Alilandaj turistoj en la strato



La surelefanta militisto antaŭ la arkado







La "Imperiestra Strato de la Norda Song-dinastio"

Parto de la domaro Fanlou



Ĉin-medicina kuracisto en vesto de Song-dinastia tipo kuracas turistinon.



**L**A 20-an de aprilo, strato konstruita imite al la Imperiestra Strato de la Ĉefurbo de la Norda Song-dinastio (960-1127) malfermiĝis al alilandaj turistoj en Kaifeng, la ĉefurbo de la dinastio kaj fama historia kaj kultura urbo de Ĉinio. Invitite de la Turisma Servo de Henan-provinco, mi partoprenis la finkonstruiĝan solenon de la turisma punkto.

En la pasaĝeraŭto veturanta de Zhengzhou, la ĉefurbo de Henan-provinco, al Kaifeng, s-ro Zhang Yibing de la provinca turisma servo konigis al ni la historion de Kaifeng. Li diris, ke la nomo Kaifeng estis donita antaŭ pli ol 2 000 jaroj. En la historio de Ĉinio Kaifeng estis ĉefurbo de 7 dinastioj. En la Norda Song-dinastio Kaifeng fariĝis la plej granda, plej prospera kaj plej impona urbo de Ĉinio kaj ankaŭ internacia urbo. Sed pro militado kaj inundo de la Flava Rivero en la fino de la dinastio, la urbo malprosperis kaj restis en ĝi nur iuj historiaj objektoj, kiuj montras ĝian pasintecon. La rekonstruado de la Imperiestra Strato de la antikva ĉefurbo reaperigis la aspekton de la tiama ĉefurbo. Ĝi servas kiel bona instrumaterialo por koni la kulturon de centra Ĉinio, kaj ankaŭ kiel nova turisma punkto.

Kaifeng distancas de Zhengzhou je ĉ. 70 km. Ni ekveturis post vespermanĝo. Kiam ni atingis la urbon, jam malheliĝis. La aŭto traveturis la Imperiestran Straton ornamitan per buntaj lampoj kaj haltis antaŭ la konstruaĵo en antikva stilo ĉe la plej norda fino. Ĝi estas la domaro Fanlou, kiu estis la plej granda el la 72 restoracioj siatempe en la ĉefurbo de la dinastio. Tiam en ĉiuj restoracioj servis disciplinitaj kantistinoj kaj dancistinoj por amuzi gastojn. Fama kantistino Li Shishi iam akompanis en Fanlou imperiestron Huizong (1100-1125 sur trono) de la dinastio, kio donis al ĝi romantikan koloron.

La nuna Fanlou estas rekonstruita, imite al tiu ekzistanta en la tempo, kiam regis la imperiestro. Ĝi, grandioza kaj orebrila, estas la ĉefa konstruaĵo sur la Imperiestra Strato. Fanlou konsistas el trietaĝaj domoj orienta, okcidenta, suda, norda kaj centra. Ĝi estas turisma servejo komplete ekipita. La orienta domo ĉe la strato estas magazeno, en kiu oni vendas turismajn objektojn en la stilo de la dinastio kaj en la loka koloro de Kaifeng. La tera kaj unua etaĝoj de la centra domo estas historiaj eksponejoj. En la dua etaĝo estas vizitataj la legoĉambro, ludejo de kordoinstrumento kaj dormoĉambro de Li Shishi. La suda kaj norda domoj simetrie sidas ambaŭflanke de la centra domo. La 4 domoj kunligiĝas unu kun alia per 2 pontetoj kaj unu koridoro. La norda domo estas eksponejo pri popolaj moroj kaj la suda estas destinita por gastoj. Ni havis la honoron esti ĝiaj unuaj gastoj. En la ĉambroj estas televidilo, telefono kaj modernaj higienaj ekipaĵoj. La okcidenta domo estas la plej alta el la 5 domoj. Tie funkcias restoracioj de ĉinaj kaj okcidentaj manĝaĵoj, kiuj povas samtempe enteni 500 turistojn.

Frumatene de la tago, kiam okazis la soleno, mi eliris tra la orienta pordo de Fanlou kaj trovis multajn homojn sur la Imperiestra Strato. Mi iris suden en la homfluo. La strato longas je 400 m. Ambaŭflanke de ĝi bonorde staras 2-3-etaĝaj domoj el grizaj brikoj kaj tegoloj, en antikva stilo, kun suprenlevitaj tegmentrandoj, ruĝaj balustradoj kaj skulptitaj fenestroj. Ili spegulas la arkitekturon de la dinastio. Tie funkcias 53 butikoj dekoraciitaj laŭ la stilo de la dinastio. Antaŭ la butikoj pendas ŝildoj, tabuloj kaj aliaj, popularaj en la Norda Song-dinastio. La mastroj kaj servistoj en kostumoj, kiajn oni portis en la dinastio, vendas turismajn varojn, pladojn kaj etmanĝaĵojn kun trajtoj de la dinastio kaj prezentas ties popolajn morojn kaj amuzojn. En la strato la turistoj sentas sin kvazaŭ en la movoplena ĉefurbo ekzistanta antaŭ mil jaroj.

Meze de la suda fino de la Imperiestra Strato staras arkado el 4 pilieroj kaj 3 spanoj, kun koloraj desegnoj en la stilo de la dinastio. Sur la horizontala tabulo legiĝas la vortoj "Imperiestra Strato de la Ĉefurbo de la Norda Song-dinastio". Ambaŭflanke de la arkado majestas po unu ŝtongravurita surelefanta militisto de la imperiestra armeo. La soleno estis okazigita ĉe la enirejo de la strato.

Ambaŭflanke de la suda fino de la strato estas 2 simetriaj angulturoj. Origine tia angulturo konstruiĝis sur la 4 anguloj de la urbomuro. Por reliefigi la trajtojn de la fama historia urbo, oni konstruis la angulturojn ĉe la fino de la strato. La angulturoj estas delikataj kaj la tegmentoj prezentas malsamajn stilojn de la arkitekturo de la dinastio. La 36 flankanguloj, harmonie aranĝitaj unu super alia, montras luksecon.

La strato vidigas la imponecon de la ĉefurbo de la dinastio. Ĝuante diversajn prezentojn ĉe la soleno, oni spertis tipajn naciajn morojn de la dinastio, kaj precipe admiris la kamparanan prezentadon kun loka gusto de Henan. ■

Esperanto eldoneja sekcio de ELDONEJO & LIBREJO SONORILO (peranto de EPĈ jam de multaj jaroj) anoncas ke aperis tute novaj luksaj gluetikadoj por viaj korespondaĵoj. La teksto estas: Esperanto langue internationale. Prezo kun la sendokostoj por 100 etikadoj estas 300 belgaj frankoj kaj tiun ĉi sumon vi povas pagi je Sonorilo konto 000-0152140-44, la adreso por mendi tiujn luksajn etikadojn estas: SONORILO vzw, Doornstraat 22, 2610 WILRIJK, Belgio.



# Ĉarma Narat

Teksto de HU YUN

Fotoj de LIU SIGONG

**N**ARAT en la ujugura lingvo signifas levigantan sunon. Lokano diris al mi, ke la suno levigas en Narat, ĉar ĉi tiu troviĝas ĉe la orienta ekstremo de la fama stepo Kunes de Xinjiang. Tamen, kiam mi vizitis Xinjiang, mi dufoje veturis tien preskaŭ mil kilometrojn ire-reire ne pro ĝia poezia nomo — tiam mi ankoraŭ ne konis ĝian signifon — sed pro interesa rakontado de iu amiko pri ĝi.

Kiam mi unuafoje atingis Narat, jam vesperiĝis. Ni, dekkelkaj personoj, tre deziris tuj ĝui la pejzaĝon de la stepo, sed oni diris al ni, ke estas necese transiri du montojn por atingi la stepon, tial ni devis atendi ĝis morgaŭ. Kvankam ni estis iom ĉagrenitaj, tamen ni iris al proksima montodeklivo por ĝui la pejzaĝon. Tie ni vidis ne stepon imagitan, sed kontinuajn

montojn. La fajroruĝa malleviganta suno pliĉarmigis la montaron. Ĉie sur la montoj estas verdaj herboj kaj aromaj floroj. Mi kontente kuŝis sur herbotapiŝo. Mi pensis, ke la unua impresoj, kiun Narat donis al mi, ne estas ĝia herbaro, sed la pejzaĝo de ĝia montaro.

Vespere laborantoj de la Turisma Administracio de Narat preparis por ni manĝaĵon de stepa gusto. En ronda jurto ni sidis en rondo sur la planko. La tapiŝo servis kiel tablo, sur kiu estis pladoj de ŝafaĵo. Ni senĝene prenis ŝafaĵon per mano por ne vanigi nian vojaĝon en la stepo. En nemalmultaj lokoj de Ĉinio, precipe en lokoj, kie oni vivas nomade, estas kutimo preni ŝafaĵon per mano. Eble tion kaŭzis vivkondiĉoj de nomadoj. La preparado de la ŝafaĵo estas simpla. La plado estas bongusta, nutroriĉa kaj varmodona. Estas etiketo por la manĝado, ekz., kiu la unua prenu

la ŝafaĵon, kiu disdonu ĝin kaj kiu ricevu kiun parton de ĝi. Kaj en nia manĝado en Narat partoprenis neniu paŝtisto, tial ni manĝis multe kaj senĝene.

Ni loĝis en gastejo por turistoj, kiu antaŭe estis loĝejo de forstokulturistoj. La gastejo estas kompreneble malpli bona ol hotelo en urbo. La viroj loĝis en jurto kaj la virinoj en ter-etaĝa domo. Nokte ventegis, kaj la vento pli kaj pli furioziĝis kaj krakigis la pordon kaj fenestrojn, ke multaj el ni sendormiĝis. Frumatene de la sekva tago subite malvarmiĝis. Servisto diris, ke tie ventegas ĉiutage, la vento daŭras ĝis tagmezo kaj nur tiam iom post iom varmiĝas. Tion ni ne atendis kaj ĉiuj tremis de malvarmo. En tiu momento la ŝoforo subite anoncis, ke lia aŭto ne povas veturigi nin al la stepo trans la monton. Kaj kun granda bedaŭro ni forlasis Narat en frosta vento.

Junaj rajdistoj en festivalo



Post kelkaj tagoj mi havis ŝancon duafoje iri al Narat. Kompreneble mi refoje veturis unu tagon per aŭto kaj sendormiĝis pro ventego, sed ĉi-foje mia deziro fine realiĝis.

La montvojo al la stepo estas mallarĝa. Sur granda parto de ĝi povas veturi nur unu aŭto. Flanke de ĝi kreskas altaj arboj, verdaj, flavaj, ruĝaj de diversaj specoj. La montoj estas tapiŝitaj de verdaj herboj.

Kiam la stepo prezentigis antaŭ mi, unue mi vidis blankajn jurtojn dissemantajn sur herbejo inter montoj. Ili estas loĝejo de kazakaj nomadoj. Ili similas al tiuj de mongoloj. Mi proksimiĝis al iu jurto kaj vidis, ke virinoj faras hejmajn laborojn kaj infanoj ludas. Iliaj vestoj estis iom malpuraj, sed iliaj

vangoj ruĝetaj kaj ili aspektis fortaj kaj sanaj. Ne malproksime iu dekkelkara knabino surĉevale rajdis rapide al mi kaj mi tuj evitis ŝin, tamen ŝi lerte saltis de sur la ĉevalo kaj ligis ĝin.

Laŭdire la kazakaj junulinoj ĉiuj estas bonaj rajdantoj, kion atestis la rajdludo de kazakaj gejunuloj okazinta posttagmeze. Per tio ili esprimis sian amon. Junuloj kaj junulinoj rajdis sur sia galopanta ĉevalo. Survoje junulinoj devas toleri ĉiajn incitajn vortojn de junuloj. Sur revenvojo, se junulino ekamas junulon, ŝi nur levas vipon, sed ne vipas; se ŝi ne amas lin, ŝi forte vipas lin. Mi vidis tian junulinon kun alte levita vipo, kiu sin montris tre fiera sur galopanta ĉevalo.



Sur kvieta stepo


#### Paŝtejo en aŭtuno








Kazakoj konkursas por kapti ŝafon.



Paŝtejo en aŭtuno

Familio sur stepo



# Baĝjiĉŭan de Mengcun

Fotoj de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de ZHAO CHANGYONG

**M**ENGCUN estas ordinara gubernio sur la Nordĉinia Ebenaĵo. Ĝi produktas tritikon, kotonon, pirojn, pomojn, jujubojn, ŝafojn, anserojn k.a. La urbo Cangzhou, al kiu apartenas Mengcun-gubernio, estas konata kiel unu el la hejmlokoj de ĉina luktarto ŭŝuo, kaj Mengcun nomiĝas lulilo de baĝjiĉŭan, speco de ĉina ŭŝuo.

Baĝjiĉŭan havas historion de pli ol 300 jaroj. Ĝi estas ĉiam uzata por fortikigo kaj memdefedo de la ekzercantoj. Kadre de la ĉina ŭŝuo, ĝi distingiĝas per subita forta bato en interpuŝiĝo. En la lastaj jaroj Mengcun fariĝis bone konata pro famiĝo de baĝjiĉŭan.

Maje de 1991 mi venis en la gubernion kaj vizitis Wu Lianzhi,

sepageneracian heredanton de baĝjiĉŭan. En tiu mezaĝulo malkaŝema, sunbruna, altastatura kaj fortika oni vidas elstaran ŭŝuiston jam ĉe la unua rigardo.

En la okuloj de siaj samlokanoj Wu Lianzhi estas legenda figuro. Li staras kiel statuo kaj iras kiel vento. Li estas mirinde forta. Tuŝinte tablon, li postlasas mansignon sur ĝi. Frapinte la teron, li tuj havigas kaveton al ĝi.

Li prezentis por mi baĝjiĉŭan. Li pugnis fulmorapide kaj piedbatis tremige. La luktarton el evitado kaj forta batado li heredis de sia patro. De la infaneco li lernis de la patro la luktarton kaj bone posedas ĝin.

Lia patro Wu Xiufeng estis fama ŭŝuisto. Inter la ŭŝuistoj cirkulas multaj anekdotoj pri li.

Jen ekzemplo. Antaŭ la Liberiĝo la luktarto de Wu Xiufeng estis ŝatata de bandĉefo de Tianjin. Foje en festeno la bandĉefo diris al Wu: "Servu ĉe mi kaj vi havos ja ĉion, kion vi deziras." "Mi estas surda kaj ne taŭgas por la laboro!" Tion dirinte, li tuj foriris. Ĉe la suda pordo de Tianjin, li vidis, ke naciperfiduloj perforte kaptas fortikajn laborulojn kaj ŝnurligas ilin. Li enŝteliĝis en la vicon de la kaptitoj kaj nerimarkite tranĉis la ŝnuron. Kiam li finis la lastan tranĉon, li ekkriis kaj ĉiuj laboruloj forkuris. Li sola ŝirmis la forkurantojn. Li brave batalis kaj neniu el la naciperfiduloj kuraĝis alproksimiĝi al li. Dank' al tio, li elturnis sin el la danĝero.

En 40 jaroj, kiam li vivis en Tianjin, li havis ĉ. 1 000 disĉiplojn,

Wu Lianzhi instruas luktarton al japanoj.



Junulo en ekzercado





kaj 80 en Mengcun.

Wu Lianzhi daŭrigis la aferon de sia patro kaj servis kun bona moralo. 18-jara, li komencis instrui uŝuon. Nun li havas la aĝon de 45 jaroj kaj funkcias kiel estro de la gubernia fizikkultura kaj sporta komisiono. Dank' al lia penado, en 1983 ekfunkciis gubernia lernejo de uŝuaj amatoroj kaj li eklaboris kiel lernejestro kaj trejnisto.

En ĉiuj mezlernejoj de la gubernio uŝuo estas instruata kiel deviga kurso. En la gubernio baĝjiĉuan estas plej populara sporto.

La 22-an de januaro 1985, helpe de Wu Lianzhi, pli ol 600 uŝuistoj de Ĉinio kunvenis en Mengcun por diskuti pri baĝjiĉuan. Post la kunveno fondiĝis en la gubernio la Ĉina Instituto de Baĝjiĉuan kun Wu Lianzhi kiel la estro. Tio vekis eĥon de ĉinaj kaj alilandaj uŝuistoj kaj japana gazeto publikigis la novaĵon.

La fondiĝo akcelis la uŝuan sporton de Mengcun. En ĝiaj urbejoj, distriktoj kaj vilaĝoj estis starigitaj uŝuistaj domoj aŭ societoj. Mi vizitis uŝuistan societon funkciigatan de Li Fuqi per lia propra mono. 10-jara, li komencis lerni uŝuon kaj, dank' al sia penado li bone posedas la arton. Ekde 1986 li organizas lokanojn por praktiki uŝuon. Surbaze de tio, li fondis la uŝuistan societon Jingmei, kies membroj plejparte estas de la vilaĝo. Li volontule instruas al ili la luktarton. Iu junulo venis al li de malproksima Xinjiang kaj faris decidon funkciigi uŝuistan domon en la loko post sia ellerno de la arto. Por disvastigi baĝjiĉuan li pene sin ekzercis kaj rimarkinde progresis post nur unu monato, dank' al la serioza instruado.

Nun Li Fuqi instruas 37 lernantojn. En blankaj silkaj vestoj kaj malhelverdaj veŝtoj, la geknaboj aspektas tre viglaj. En la tago, kiam mi vizitis ilin, dekkelkaj lernantoj prezentis por mi plurajn sekciojn de baĝjiĉuan. Li Fuqi diris: "En baĝjiĉuan la sekcio ŝjaŭĝja estas la bazo. Ĝia enhavo estas profunda kaj implicita. Ĝi servas kiel

bona rimedo por fari fundamentajn ekzercojn kaj ankaŭ bona formo por prezenti la ŝanĝiĝon de *jin*-kaj *jang*-energioj en la luktarto."

La geknaboj prezentis piedbataĉon, frapadon, genuadon, ĉetalian boksadon, korpo-turniĝadon k.a. Kvankam simplaj, la movoj estas variemaj kaj raciaj.

Kun glavo, spado aŭ lanco en la manoj, la bravaj prezentantoj rapide sin turnis kaj saltis supren, kio multe ravis la rigardantojn.

Nun en Mengcun funkcias 30 uŝuistaj domoj kaj societoj. Uŝuistoj elbakitaj de ili atingis bonajn sukcesojn en provincaj kaj landskalaj uŝuaj konkursoj. Liu Xiuping, Chang Yugan kaj Liu Lianjun gajnis ĉampionecon en uŝuaj konkursoj de Ĉinio.

Tiuj eminentaj uŝuistoj aperis el la arda uŝu-ekzercado de popolamasoj. Ĉu matene, ĉu vespere, oni arope sin ekzercas per uŝuo en vilaĝoj, fabrikoj, lernejoj kaj oficejoj de Mengcun. Ofte videblas, ke postlecionaj lernantoj kaj ripozantaj kamparanoj sin ekzercas per piedbato, pugnado kaj lancado. Precipe en postsezono de la kamplekto amatoroj de uŝuo mem organizitaj, arope prezentas baĝjiĉuan kaj diskutas pri la tekniko. En Mengcun loĝas multaj huj-oj. Ĉe diservo en moskeo ili kune sin ekzercas per la luktarto. Kia granda spektaklo!

Inter la ekzercantoj estas kaj veteranaĵoj uŝuistoj kaj antaŭlerneaj infanoj.

75-jara Feng Leishan komencis sin ekzerci per uŝuo jam antaŭ 60 jaroj. Li instruis 200 lernantojn. Li serioze laboris kaj severe traktis siajn lernantojn.

Mi vizitis alian maljunan uŝuiston. Li pugnadas kaj piedbatas forte kiel en sia juneco. 5-jara infano komencis sin ekzerci per uŝuo antaŭ du jaroj. Liaj movoj, kvankam naivaj, montriĝis tre viglaj.

Iu junulo, kiu laboras en la olekampo Dagang proksime al la urbejo Tianjin, lernas baĝjiĉuan en Mengcun en postlaboraj horoj. Ĉiufoje li biciklas 20 km al

Mengcun. Li daŭrigis la ekzercadon ses jarojn. Lia luktarto karakteriziĝas per forteco kaj rapideco.

Bazaj ekzercoj estas gravaj por posedi la luktarton. Proverbo diras, ke estos nenia sukceso sen fari bazajn ekzercojn. La bazajn ekzercojn de baĝjiĉuan konsistigas bataĉo de arbo, bataĉo de sako plena de sablo kaj manpuŝado. La baĝjiĉuan-praktikantoj en Mengcun donas grandan atenton al bazaj ekzercoj. Chang Yugan, eminenta disĉiplo de Wu Lianzhi, diris al mi: "Por bone posedi la esencon de baĝjiĉuan-a kaŭro oni devas sin ekzerci almenaŭ tri monatojn. Sen pena ekzercado oni ne posedas baĝjiĉuan." Chang estas fortika 30-jarulo. Li laboras kiel vicedirektoro de la Mengcun-a Kompanio de Koton kaj Kanabo. En la Ĉina Turniro de Nacimalplimulta Uŝuo en 1991 li gajnis du orajn medalojn en la konkursoj de baĝjiĉuan kaj liuhe-lancado.

La famo de Mengcun altiris la atenton de multaj eksterlandanoj. En 1982 la japana uŝuista grupo gvidata de s-ro Takatomo Matsuda vizitis la gubernion. Li admiris: "En Mengcun mi multe ĝuis la tradician ĉinan uŝuon." En 1985 la sesmembra vizitgrupo de la Japana Instituto pri Wudang-sekto kun s-ro Toshiguki Shiehido kiel la ĉefo speciale alvenis al la loko kaj petis Wu Lianzhi instrui al li la luktarton. De 1986 Wu ĉiujare invitive prelegas en Japanio.

Wu Lianzhi profunde esploris la teorion pri baĝjiĉuan kaj figure komparis ĝiajn movojn kun uzmanieroj de martelo kaj hakilo. Surbaze de tio, li elpensis ok manajn movojn kaj ses piedbatojn kaj ekzercigas siajn disĉiplojn per ili. Li kaj s-ro Toshiguki Shiehido kune verkis "Baĝjiĉuan de Wu-familio" en la japana lingvo. Japanaj uŝuistoj bildbendigis ĝin kaj prenas ĝin por studobjekto.

En la lastaj jaroj baĝjiĉuan estis enkondukita en Usonon, Germanion, Italion, Aŭstralion, Singapuron kaj Hongkongon kaj fariĝis unu el la ŝatataj fizikaj ekzercoj de tiuj lokoj. ■



Veterana uŝisto en instruado



Triopa ekzercado

Wu Lianzhi





MODERNAJ VESTOJ

## "REVENO"

Foto de CAI HAIFENG



La somera vesto-kompleto kun la nomo "Reveno" estas projektita de juna artisto Mao Jihong. Ĝi distingiĝas per delikata koncepto, freza strukturo kaj elstara karakterizaĵo. Kun kanela ŝtofo kiel materialo la vesto montras la kunfandiĝon de modernaj kaj tradiciaj trajtoj kaj sugestas revonon al la naturo. En la lasta tempo ekspozicio de ĉinaj kaj aŭlandaj vestoj ĝi estis alte taksata de fakuloj.



Nanpu-pontego en Ŝanhajo

### EKONOMIO

- La granda Nanpu-pontego en la ekspluata distrikto Pudong de Ŝanhajo estas transdonita al uzado.

Ligante la distrikton Pudong kun Puxi, la pontego kuŝas super Huangpu-rivero. Ĝi longa 8.5 km ebligas transpason de 50 miloj da aŭtoj ĉiutage. Sur ĝi povas veturi paralele 6 aŭtobusoj kaj 50 000-tonela ŝipo sub ĝi.

- Post realigo de la konduko de la akvo el Luanhe-rivero en Tianjin kaj tiu el la Flava Rivero en Qingdao, nun sukcese konstruiĝis alia kanalo, kiu kondukas akvon el Qinglong-rivero en Qinhuangdao. La kanalo 80 km longa ĉiujare kondukas 63 milionojn da kubmetroj da akvo al Qinhuangdao. Ĝi ludos gravan rolon por mildigi la akvan problemon de la urbo Qinhuangdao.

- La unua surtera satelita stacio de internaciaj maraj aferoj ekfunkciis la 3-an de junio en Pekino. Tio markis, ke la tekniko de movebla telekomuniko de Ĉinio nun estas avangarda en la mondo.

- La Lubuge-hidroelektrajo de Yunnan-provinco, la unua ĉina hidroelektrajo, adjudikita internacie kaj konstruita per kredita mono de la Monda Banko, donas elektron je 106 tagoj pli frue ol la tago difinita de la plano.

La hidroelektrajo situas apud Huangnihe ĉe la limo de la provincoj Yunnan kaj Guizhou. Kun 4 generatoroj ĝi ĉiujare produktos 2.75 miliardojn da kWh.

- Antaŭ nelonge en Ŝanhajo finkonstruiĝis la

150 000-tonela flosdoko "Nantong". Ĝi estas 254 m longa kaj 58 m larĝa kun areo egala al 20 korbopil-kaj kampoj. Ĝia finkonstruiĝo ebligas al Ĉinio mem ripari plej grandajn ŝipojn de la oceanŝipa floto.

- La 5-an de julio en Pekino faris interkonsenton la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Petrolo kaj Natura Gaso kaj Japana Nacia Ole-korporacio pri kuna prospektorado de petrola geologio kaj geofiziko en la regiono de Kashi-Yecheng de Tarim, Xinjiang.

Laŭ interkonsento Ĉinio kaj Japanio organizos miksan grupon de ĉinaj kaj japanaj specialistoj, kiu faros prospektadon en la areo de 32 000 km<sup>2</sup> en 4.5 jaroj ekde la dua duonjaro de 1991.

- En la lastaj jaroj denove ekfunkciis aŭkcioj en Pekino, Ŝanhajo, Chengdu, Xi'an, Kantono kaj aliaj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. La aŭkcio de Chengdu funkcias unufoje ĉiusemajne. Nun la ĉinaj aŭkcioj vendas ĉefe hejmajn elektroaparatojn, historiajn objektojn, kaligrafiajn, orajn kaj arĝentajn juvelojn, antikvaĵojn kaj malfacile vendatajn varojn.

### JURO

- La unua faka tribunalo pri proprieto de scioj fondiĝis en la Pekina Mezgrada Popola Juĝejo. Ĝi ludos gravan rolon por protekti la proprieton de scioj kaj akceli la sociajn produktajn fortojn.

### SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

- La 6-an de junio, je la 10-a horo kaj iom pli, laŭ la somera pekina tempo, la Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis grandajn torĉojn de la suno. La registro de radiometro montras, ke la intenso de radio estas 61-oble pli granda ol tiu en la kvietaj fazoj de la suno.

Fakuloj diris, ke nun ie sur la tero la klimato anormalas, jen kaj jen atakas naturaj katastrofoj. Pluraj ĉinaj provincoj estas trafataj de inundo. La malsupra baseno de Yangzi-rivero eniris en la sezonon de senĉesa pluveto je unu monato pli frue ol ordinare. Tiuj anormalaj fenomenoj estis estigitaj de la intensa aktiveco de la suno.

- La ricev-sistemo de nubaj bildoj senditaj de meteorologia satelito farita de Ĉinio funkcias jam 5 jarojn. La faktoj pruvis, ke ĝi estas proksima al la monda nivelo kaj nun multaj meteorologiaj stacioj de Ĉinio estas ekipitaj per ĝi.

- Antaŭ nelonge la dua pulsoreaktoro en la mondo finkonstruiĝis en Sichuan-provinco kaj ekfunkciis.

Ĝi estas destinita ĉefe por produktado de izotopoj





La Historia Muzeo de Shaanxi-provinco

kaj analizado de aktivigitaj neŭtronoj. Ĝi povas esti uzata en elektroproduktado, kio multe mallevas la produktokoston de elektro. Kaj pro tio ĝi havas brilan perspektivon.

### KULTURO

- Malfermiĝis la plej granda moderna muzeo en Ĉinio — Historia Muzeo de Shaanxi-provinco.

Ĝi situas en la suda antaŭurbo de Xi'an, ĉefurbo de la provinco. La muzeo, kun konstrua areo de 56 000 m<sup>2</sup>, kovras 70 000 m<sup>2</sup>. Ĝia domo kun arkitektura stilo de Tang-dinastio (618-907) entenas 3 000 valorajn objektojn uzitajn en la historio de miliono da jaroj en Shaanxi-provinco. Ili plejparte estas raraj trezoroj, unuaklasaj kaj duaklasaj historiaj objektoj. Interalie 39 Tang-dinastiaj freskoj estas unuafoje publike eksponataj.

- S-ro Wang Hengjie, arkeologo kaj profesoro de la historia fakultato de la Centra Nacimalplimulta Instituto, la unua trovis historiajn objektojn de neolitiko (antaŭ 10 000-4 000 jaroj) kaj Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) en Xisha-insularo de la Suda Ĉina Maro kaj dank' al tio li trovis atestaĵon de la literaturaj notoj pri la teritorio de Chu-regno, kiu kovras la Sudan Ĉinan Maron.

- Arkeologoj prifosis bone konservitan tombon de aristokrato de Shang-dinastio (17-a jc — 11-a jc a.K.) en Anyang, Henan-provinco. Ili elterigis 349 objektojn bronzajn, ceramikajn, jadajn, bambuajn, ŝtonajn, ostajn kaj dentajn.

- La ruinoj de Shang-dinastio troviĝas nordokcidente de la urbo Anyang, kie nun sidas la vilaĝo Xiaotun. Tie estis la ĉefurbo de Shang-dinastio en la



Senditoj (Tang-dinastia fresko)

malfrua periodo.

- 695.25-kvadratmetra fresko "Mirinda Pejzaĝo" en ĉina stilo 51.5 m longa kaj 13.5 m larĝa el 250 silkaj pecoj estas finfarita en la halo de la Hotelo Shangri-La en Hongkongo. Ĝi, la plej granda silka fresko en la mondo, estas farita de 20 junaj kaj mezaĝaj pentristoj de la Meti-belarta Instituto de Pekino en duonjaro.

- En la meza somero la Pekina Popola Arta Teatro unuafoje surscenigis "Majoro Barbara", dramon de fama angla verkisto Shaw George Bernard. La dramon ĉinigis kaj reĝisoris Ying Ruocheng, fama artisto de Ĉinio. La dramo kun malsimplaj intrigoj kaj humura lingvo prezentis akran konflikton de kristano Barbara kun lia patro, municia komercisto, pro malsama kredo. La prezenton varme aplaŭdis pekinaj spektantoj.

- La 8-an de julio finiĝis la 22-a Internacia Fizika Konkurso en Havano. 5 ĉinaj mezlernejoj partoprenis ĝin kaj ili ĉiuj gajnis oran medalon.

En la konkurso estis 13 oraj medaloj entute. Sovetunio gajnis 3, Hungario 2, Kanado, Norvegio kaj Usono gajnis po unu oran medalon.

### TURISMO


- Ĉi-jare pli kaj pli da alilandaj turistoj vizitas Pekinon. Laŭ statistiko de la Pekina Turisma Servo en la unuaj 6 monatoj de la kuranta jaro Pekinon vizitis 553 000 eksterlandaj turistoj, je 15.2% pli multe ol en 1991. Pli ol 80% de la ĉambroj de la hoteloj Changfugong, Jianguo, Changcheng, Jinglun, Beijing k.a. estis luitaj.

# Papertondaĵoj de Yuxian-gubernio

Teksto de LI QIANG



Papertondaĵoj vendataj sur strato en la gubernio



Ambirdoj

Pavoj



Longevivulo







Metiartisto Zhou He

**L**A ĉina papertondaĵo estas plastika artaĵo farita per tondilo aŭ tranĉilo. Plejparto de la papertondaĵoj estas farita de diligentaj kaj saĝaj kamparanoj, tial la verkoj spiras simplecon kaj fortan kamparan guston kaj estas tre ŝatataj tradiciaj popolaj metiartaĵoj.

Papertondaĵoj produktiĝas preskaŭ tra la tuta Ĉinio, kaj ĉiu loko donas sian guston al la metiartaĵoj. La plej distingiĝa papertondaĵo en la nordo de Ĉinio estas farita en Yuxian-gubernio, Hebei-provinco. En tiu loko papertondaĵoj estas uzataj ĉefe kiel ornamaĵoj sur fenestroj. Ĉe la novjara festo kamparanoj gluas papertondaĵojn sur fenestroj por plidensigi la festan atmosferon. Por bone koni la arton mi aŭte veturis okcidenten al la monta gubernio, kiu distancas de Pekino je malpli ol 300 kilometroj.

Laŭ mia scio, la papertondaĵoj de la gubernio distingiĝas per delikataj tondoj, freŝaj koloroj, integraj desegnoj kaj viglaj figuroj. En la gubernio plej elstaras la papertondaĵoj de la vilaĝo Nanzhangzhuang. Tial en la sekvan tago mi iris viziti la vilaĝon.

La vilaĝo estas tre maljuna, kaj ĝiaj papertondaĵoj havas historion de ĉ. 200 jaroj. Antaŭe en

la vilaĝo vivis fama metiisto Wang Laoshang. Li komencis lerni kolorigadon en la aĝo de sep jaroj kaj en la aĝo de 12 jaroj li komencis fari papertondaĵojn. Li dediĉis sian tutan vivon al la arto. Li kolektis papertondaĵojn de multaj lokoj kaj faris esplordon super ili. Surbaze de heredo, li senĉese renovigis sian teknikon. Li projektis kaj tondis 600 homfigurojn de 100 teatroj. Plejparto de liaj papertondaĵoj estas unuopaj figuroj sen specifaj intrigoj, kadroj kaj fonoj. La figuroj sentigas grandan movecon, havas viglajn mienojn; la koloroj estas freŝaj, sed ne okulpikaj, kun nuancoj abundaj, tial formiĝas originala stilo, kiu donas novajn karakterizaĵojn al la papertondaĵoj de Nanzhangzhuang.

Plejparto de la familioj de Nanzhangzhuang povas fari papertondaĵojn kaj ili heredis kaj disvolvis la arton de Wang Laoshang. Mi vizitis kelkajn familiojn kaj vidis iliajn verkojn. Mi rigardis ankaŭ la farejon de papertondaĵoj de la vilaĝo. 20-jara junulo Jiao Xinbin faris multajn distingiĝajn papertondaĵojn, kaj iuj el ili estis presitaj sur kalendaroj kaj kovriloj de libroj.

Mi forte admiris la verkaron de Zhou He. Liaj papertondaĵoj prezentas homfigurojn en mito, legendo kaj teatro, papiliojn, pavojn, gruojn kaj insektojn. La plej okulfrapa el liaj papertondaĵoj estas homfiguro. Li aĵure tondis la brovojn, okulojn, buŝon, nazon, harojn, ornamaĵojn de vestoj kaj zonoj, kio donis drastan tridimensian kaj movan impreson. Mi plej admiris desegnojn de vizaĝoj de roluloj en la pekina opero. La haroj kaj lipharoj estas tre longaj kaj maldikaj. Se okazas apenaŭa malatento en tondado, difektiĝos tuta verko.

Zhou He estas kamparano kun la aĝo de 40 jaroj. Li elprenis

multajn longajn akregajn tranĉiletojn kaj metis ilin sur tablon kun ronda kavaĵo en la mezo. En la kavaĵo estis vakso. Li diris, ke oni gravuras sur vaksa tavolo, por teni la tranĉilojn kaj tablon sendifektaj.

Oni gravuras sur stako da bonkvalita papero, kaj la plej supera folio surhavas desegnon. Laŭ la desegno la artisto gravuras per tranĉiletoj kun diversformaj klingoj. Dum gravurado li devas ofte rigardi, ĉu la klingoj estas akraj, se iu klingo estas difektita, li devas akriĝi ĝin, alie sola fuŝa tranĉo difektos la verkon.

Ne estas facile ankaŭ kolorigi. Zhou He diris, ke ĉarma papertondaĵo dependas ĉefe de kolorigo. Kolorigi papertondaĵojn en ununura koloro estas malfacile. La verko devas surhavi multajn nuancojn de unu koloro. Ekzemple, la mezo de floro devas esti malhele ruĝa, dum la eksteraj petaloj hele ruĝaj, sed inter diversaj nuancoj ne devas esti evidenta limo, kaj tio postulas altan teknikon.

Laŭ informo, en la lastaj jaroj multe disvolviĝis la arto de papertondaĵoj de Yuxian-gubernio. En la gubernio estas miloj da specoj de papertondaĵoj kaj ili evoluis de unuopaj en seriajn. La papertondaĵoj de Yuxian-gubernio vendiĝas en pli ol 40 landoj kaj regionoj.

Zhou He montris grandan ĝojon, kiam li informiĝis, ke legantoj de EPC estas diverslandaj esperantistoj. Li donis al mi centojn da siaj papertondaĵoj, ke mi donacu ilin al alilandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri ĉinaj papertondaĵoj. La redakcio de EPC intencas donaci liajn papertondaĵojn al la alilandaj legantoj, kiuj partoprenos la duan konkurseton de legado aranĝita de la rubriko "AMUZOJ" en la 11-a numero de nia gazeto. ■



D-ro Sun Yatsen (la meza en la dua vico) kaj membroj de la Ĉina Revolucia Ligo, en Usono

**L**A 10-a de oktobro 1911 estis la unua granda tago en la moderna historio de Ĉinio. En tiu tago, orientate de la revolucia penso de D-ro Sun Yatsen, la ĉina popolo levis en Wuchang insurekcion kontraŭ Qing-dinastio (1644-1911). Post nelonge la regado de la dinastio estis renversita, tiel ke finiĝis la feŭda reĝimo praktikata dum pli ol 2 000 jaroj kaj fondiĝis respubliko.

Post kiam la Unua Imperiestro (259-210 a.K.) de Qin-dinastio starigis feŭdan reĝimon, la ĉina kamparano neniam ĉesigis sian batalon kontraŭ ĝi. La tiama batal-slogano estis ĉefe "Mortigi la murdintojn kaj pagigi la vundintojn". Tio estis postulo de la popolanoj por gajni la vivrajton. En la fruaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960-1127) Wang Xiaobo ribelis en Sichuan kun la slogano "Egaldividi la riĉaĵon". Tio estis postulo pri proprieto. En Yuan-dinastio (1279-1368) cirkulis la diro "ege mizera la regiono sude de Yangzrivero kaj sufiĉe riĉa tiu norde de la Granda Muro". Tio montris la akrecon de la kontraŭdiro inter la mongola kaj han-a naciecoj. En la fino de Yuan-dinastio la kamparanoj ribelis kontraŭ la nacia subpremo. La kamparanoj ribelintaj en ĉiuj dinastioj tute ne komprenis la naturon de la feŭda sistemo kaj

prezentis malsamajn postulojn, tamen ilia aktivado estis kontraŭfeŭda praktiko. En siaj kompare grandskalaj insurekcioj la kamparanoj ĉiam direktis sian batalon al la imperiestra aŭtoritato, opiniante, ke tiu ĉi aŭtoritato estas nur imperiestro aŭ kortego, sed ne la feŭda reĝimo mem. En tiu senco la Revolucio de 1911 estis senprecedenca en la kontraŭfeŭda batalo de la kamparanoj dum 2 000 jaroj. Ĝi oponis ne nur kontraŭ Qing-kortego, sed ankaŭ kontraŭ la feŭda reĝimo, kio multe antaŭenpuŝis la demokratian revolucion.


La Revolucio de 1911 okazis sub sufiĉe komplikaj kondiĉoj. La longtempa enlanda batalo de Qing-dinastio, humiliĝo de Qing-kortego en la ekstera rilato kaj disvastigo de la burĝa penso, ĉio ĉi tio estis gravaj historiaj kondiĉoj de la Revolucio de 1911.

Qing-dinastio estis periodo, kiam rapide disvolviĝis la ĉina feŭda reĝimo kaj senĉese leviĝis kamparanaj insurekcioj. La insurekcioj karakteriziĝis per ofteco, granda skalo, longa daŭro kaj kuniĝo de kontraŭdiroj inter naciecoj kaj klasoj, kaj celis bati ĉefe la feŭdan regadon de manĉuraj nobeloj. Ekde la mezo de la 19-a jarcento la batalo intensiĝis tagon post tago. La grandioza Revolucio de la Taiping-a Ĉiela Regno gvidata de

Hong Xiuquan<sup>2</sup> daŭris 14 jarojn. Nian-armeo<sup>3</sup> bataliris 18 jarojn en 8 provincoj. Nacimalplimulto en la regionoj de sudokcidenta Ĉinio, kia Yunnan, kaj tiuj de nordokcidenta Ĉinio, kiaj Shaanxi kaj Gansu, senĉese levis insurekciojn. Du Wenxiu<sup>4</sup> kaj liaj armeanoj persistis en batalo 20 jarojn. Qing-kortego subigis ĉiujn tiujn insurekciojn, tamen ĝia regado pli kaj pli malfortiĝis. Tio malfermis vojon al la Revolucio de 1911.

Post la Opia Militos Qing-kortego retiriĝis paŝo post paŝo en la eksteraj aferoj. Kiam la enlanda situacio estis streĉa, ĝi senhonte petis helpon de imperiismaj potencoj. Ĝi petis de fremda lando municion kaj organizadon de taĉmento kun eŭropaj fusiloj por subigi la Revolucion de la Taiping-a Ĉiela Regno. Qing-armeo kaj fremdaj agresantoj kune atakis Yihetuan-movadon<sup>6</sup> por pereigi ĝin. Subpremane la insurekciajn armeanojn de sudokcidenta kaj nordokcidenta Ĉinio, Qing-kortego estis pli-malpli helpata de imperiismaj potencoj per municio. Krom koncesii teritorion kaj kompensi per mono, Qing-kortego ankaŭ fordonis senskrupule al aliaj landoj minejan kaj fervoj-konstruan rajtojn. Ĝi ne nur

Revoluciaj armeanoj en batalo kontraŭ Qing-armeo en Hankou





# LA REVOLUCIO DE 1911

de BAI SHOUYI

estis putra en internaj aferoj, sed ankaŭ volonte submetiĝis al imperiismaj potencoj. Tio plene montris, ke Qing-kortego, kiel feŭda regpotenco, estis kancero por la ŝtato kaj popolo. Se ĝi ekzistus plu, ĝi donus nenion alian ol venenon. El tio oni pensis tiam, ke ekzistas ne nur Qing-kortego, sed ankaŭ la feŭda reĝimo mem. Kompreneble, por havi la konon oni bezonis sufiĉe longan tempon.

La ĉiam pli vaste disvastiĝanta penso de la burĝa demokratia revolucio, precipe la penso de D-ro Sun Yatsen, determinis la karakteron de la Revolucio de 1911, kaj, dank' al ĝi, finiĝis la feŭda reĝimo kaj fondiĝis la respubliko. En 1894 D-ro Sun Yatsen starigis la Asocion por Relevi Ĉinion en Honolulo, la plej fruana revolucionan socion de la burĝa revolucio de Ĉinio. La asocio prezentis sian postulon "starigi unuigintan registaron". En 1905 D-ro Sun Yatsen faris paroladon al ĉinaj studentoj en Japanio, malkaŝis la intrigon de konstitucia reĝimo kaj montris la necesecon kaj aktualecon de respubliko kaj neeviteblecon de sangfluo. Samjare, unuiginte membrojn de


la Asocio por Relevi Ĉinion, Asocio por Prosperigi Ĉinion, Asocio por Starigi Respublikon kaj Sciencan Kurso, li organizis la Ĉinan Revolucionan Ligon. La politika programo de la ligo estis "Forpeli la tatarojn, restarigi la ĉinan nacion, establi respublikon kaj egaligi terposedantecon". Poste, la ligo eldonis sian organon "Respublika Ĵurnalo". En ĝia enkonduko Sun Yatsen disvolvis la politikan programon en la Tri Popolajn Principojn (Naciismo, Demokratio kaj Popola Vivo), kiuj ludis gravan rolon en la burĝa demokratia revolucio. La tiel nomataj tataroj aludis la potententantojn de la mandarenoj, sed ne ĉiujn manĉurojn. Tiam oni havis profundan malamon kontraŭ la manĉuraj regantoj, tial la slogano "forpeli la tatarojn" estis facile akceptebla, sed tio ne estis la ĉefa celo de la tiama revolucio. Dum la organizado de la ligo oni proponis nomi ĝin Ĉina Kontraŭmanĉura Revolucia Ligo, sed Sun Yatsen ne aprobis tion, opiniante, ke la revolucio celas ne sole manĉurojn, sed celas ankaŭ nuligi despotismon kaj fondi respublikon. Okaze al la unua datreveno de la fondiĝo de "Respublika Ĵurnalo",

Sun Yatsen diris, ke naciismo kaj demokratio devas esti praktikataj samtempe, alivorte, la renverso de la feŭda regado de Qing-kortego devas identiĝi kun la finiĝo de la feŭda reĝimo.

La Ĉina Revolucia Ligo kaj aliaj revoluciaj organizaĵoj faris armitajn batalojn unu post alia, sed ili ĉiuj malsukcesis. Post sia fondiĝo la ligo gvidis plurajn armitajn batalojn. Aprile de 1911, komisiite de Sun Yatsen, Huang Xing<sup>7</sup> organizis la Kantonan Insurekcion. Gvidate de Huang Xing, dekoj da bravuloj konkeris la oficejon de la ĝenerala prefekto de Guangdong kaj Guangxi. Poste ili malvenkis. La insurekcio skuis la tutan landon. La diverslokaj registaroj terurigiĝis kaj intensigis sian gardon kontraŭ revoluciuloj. Ĉ. duonjaron post tio eksplodis Wuchang-insurekcio.

Oni faris longtempan preparadon por Wuchang-insurekcio. Antaŭ 1911 en Wuchang oni planis insurekcion plurfoje, sed malsukcesis. D-ro Sun Yatsen sendis personon al Wuchang kontaktiĝi ĉefe kun la Nova Armeo pri la insurekcio. La ĉefa forto de la insurekcio

Sidejo de la milita registaro en Wuchang, kiun starigis revoluciuloj post Wuchang-insurekcio



de 1911 estis la Nova Armeo. La organizantoj de la insurekcio estis la Literatura Asocio kaj Kune Antaŭeniranta Asocio de Hubei, kiuj ĝuis vastan influon en la Nova Armeo kaj Hui-partio kaj varbis ĉ. 5 000 soldatojn, egale al 1/3 de la totala nombro de la membroj de la Nova Armeo, inkluzive de tiuj de la infanterio, artilerio kaj konstrua trupo. Vespere de la 10-a de oktobro, eksplodis Wuchang-insurekcio. La revolucia armeo atakis rekte la oficejon de la ĝenerala prefekto. Kaj fuĝis ĝenerala prefekto Rui Zheng. Post ununokta batalo la revolucia armeo konkeris Wuchang. En la sekvanta tago ĝi konkeris Hanyang kaj Hankou. La bone disciplinita revolucia armeo estis laŭdata de la loĝantoj. Iuj armeanoj konsolis la konsterniĝintajn loĝantojn kaj subtenis stumblantojn. Ĉio ĉi tio montris ilian amon al la popolamasoj kaj ilian fidon al la perspektivo de la revolucio.

La venko de la insurekcio skuis Pekinon, ke Qing-kortego tuj ekpraktikis militleĝojn. Instigate de Wuchang-insurekcio, diverslokaj poloj levigis unuj post aliaj. Ĝis la lasta tagdeko de novembro 14 provincoj deklaris sendependiĝon, kaj Qing-kortego alfrontis disfalon. Novembre la reprezentantoj de diversaj provincoj interkonsiligis en Wuhan pri organizado de centra registaro. En decembro ili decidis preni Nankinon kiel la sidejon de la Provizora Registaro de la Respubliko de Ĉinio. Poste, ili kunvenis en Nankino kaj elektis Sun Yatsen kiel la provizoran prezidanton de la respubliko. La 1-an de januaro 1912 Sun Yatsen deklaris sian prezidantiĝon kaj la fondiĝon de la Respubliko de Ĉinio. Tio estis grava signo de la fondiĝo de burĝa respubliko en Ĉinio, kaj ankaŭ la kulmino de la Revolucio de 1911. En sia "Deklaro de Provizora Prezidanto" Sun Yatsen diris: "La insurekcio daŭris nur kelkajn monatojn, jam liberiĝis dekkelkaj provincoj. Tio estas senprecedenca en la historio."

La rapida disvolviĝo de la re-

volucia situacio estis neatendita de la revoluciuloj. Post sia fondiĝo la Provizora Registaro alfrontis diversajn separatismajn fortojn malfacile venkeblajn. En sia deklaro Sun Yatsen emfazis la unuecon de la nacio, teritorio, armeo, interna regado kaj financo. Poste, la revoluciuloj kompromisis anstataŭ batali. Ili konsentis, ke Yuan Shikai prenos la provizoran prezidantecon, kondiĉe ke la imperiestro de Qing-dinastio abdikigos kaj Yuan Shikai aprobos la respublikon, tial Yuan Shikai fariĝis la provizora prezidanto la 10-an de marto 1912.

D-ro Sun Yatsen funkciis kiel provizora prezidanto nur pli ol du monatojn. Li faris tri grandajn aferojn. Unue, li fondis la respublikon kaj anstataŭigis heredan sistemon per la elekta, diktaturon de imperiestra familio per apartiĝo de tri potencoj kaj imperiestrajn korteganojn per konsilantoj gvidataj de ĉefministro de la ŝtata konsilantaro. Tio estis sufiĉe kompleta formo de burĝa ŝtato; due, li difinis bazajn rajtojn kaj devojn de la poloj kaj emfazis, ke la suverenco de la Respubliko de Ĉinio apartenas al la tuta popolo. Tio markis leĝan formon por la poloj, kiuj liberiĝis el la feŭda kateneno. Tio montris la statusan ŝanĝiĝon de regatoj de imperiestro al civitanoj de la respubliko; kaj trie, li pledis por la unuigo de la naciecoj hana, manĉura, mongola, huja kaj tibeta. Kvankam multe ne konforma al la aktualaj kondiĉoj de la naciecoj sur la ĉina teritorio, tamen tio montris, ke la koncepto pri nacia egaleco eniris la politikan vivon, kiel gravega iniciativo por la multnacia lando. La tri aferoj, plenaj de demokratia spirito, povas esti rigardataj kiel gravaj fruktoj de la Revolucio de 1911.

Ĝenerale dirite, la Revolucio de 1911 estis kontraŭfeŭdisma kaj kontraŭimperiisma burĝa demokratia revolucio. Ĝi ne elmetis klaran kontraŭfeŭdisman kaj kontraŭimperiisman sloganon nek daŭrigis la batalon ĝis la fino, tamen ĝi finis la feŭdan regadon de

Qing-dinastio kaj feŭdan reĝimon praktikatan dum pli ol 2 000 jaroj. Poste, tre malmultaj kuraĝis fari restaŭron en la nomo de imperiestro, kaj neniu estis subtenata pro sia restaŭro. Iuj politikaj paroloj kaj sistemaj decidoj, faritaj de Sun Yatsen en tiu periodo, havis grandan historian signifon. La popol-demokratia revolucio estis longdaŭra historia proceso. La Revolucio de 1911 havis epokfaran signifon. ■

1. La aŭtoro estas fama historiisto, profesoro de la historia fakultato de la Pekina Normala Universitato kaj unu el la iniciatintoj de la societo "Amikoj de Esperanto".
2. Hong Xiuquan (1814-1864) estis gvidanto de la Revolucio de la Taiping-a Ĉiela Regno, landskala kamparana revolucia milito en la moderna Ĉinio. Li publikigis la programan dokumenton "Agrara Sistemo de la Ĉiela Dinastio", kiu difinis, ke "ĉiu kamparano rajtas ricevi porcion da agroj".
3. Nian-armeo estis norda kamparana ribelinta armeo en la periodo de la Revolucio de la Taiping-a Ĉiela Regno.
4. Du Wenxiu (1823-1872), gvidanto de la huj-nacieca insurekcio de Yunnan, praktikis politikojn de malpeza imposto kaj emfazo de agrikultura produktado.
5. Opia Milito (1840-1842) estis agresa milito levita de Britio kontraŭ Ĉinio. De la fino de la 18-a jarcento Britio eksportis grandan kvanton da opio en Ĉinion. Junie de 1839 Lin Zexu, revizoro de Qing-registaro, detruis 1 500 000 kg. da opio ĉe la malprofundaĵo de Humen, Kantono. Instigate de Usono, Francio k.a., Britio levis agresan militon kontraŭ Ĉinio en 1840.
6. Yihetuan-movado, kontraŭimperiisma patriota movado de la ĉina popolo kun kamparanoj kiel la ĉefa forto, okazinta en 1900, oponis kontraŭ imperiistoj, kiuj atencis fervojan kaj minejan rajtojn de Ĉinio kaj dividis teritorion de Ĉinio.
7. Huang Xing (1874-1916), demokratia revoluciisto en la moderna Ĉinio.
8. Yuan Shikai (1859-1916), gvidanto de la nordaj militaristoj de Ĉinio, kruele subpremis Yihetuan-movadon en komploto kun la germanaj agrezantoj. Por uzurpi la postenon de prezidanto de la Respubliko de Ĉinio, li minace devigis Sun Yatsen rezigni sian postenon, subtenate de imperiistoj. Li deklaris sian imperiestriĝon, sed baldaŭ nuligis ĝin sub la komdamno de la tuta popolo.



## EL ĈINAJ GAZETOJ

### SUN YATSEN DEZIRIS FARI ĈINION LA UNUA SOCIALISMA LANDO EN LA MONDO

La 5-an de aprilo 1912, D-ro Sun Yatsen diris al ĵurnalisto de "Kontinento" de Ŝanhajo "Revolucio estas mia dumviva kariero. Nun la revolucio jam sukcesis. Poste, Ĉinio praktikos socialismon, por ke la popolo vivu riĉan vivon." La 14-an de oktobro samjare li oratoris: "Mi estas unu el la kredantoj de socialismo. Sed la teorio de socialismo estas profunda kaj kompleksa. Ĝin ne komprenas ne nur ĉinoj, sed ankaŭ multaj eŭropanoj. La teorio de socialismo en la nuna Ĉinio troviĝas en la primara periodo, samkiel ĝi estis en sia komenco en Eŭropo. Se oni agos senskrupule, estiĝos multe da miskomprenoj kaj obstakloj." En majo 1914, Sun Yatsen skribis leteron al la Internacia Buroo de la Socialdemokratiaj Partioj. La letero legiĝas jene: "Kamaradoj, mi turnas min al vi kun peto, ke Ĉinio fariĝu la unua socialisma lando en la mondo. Koncentru vian atenton sur Ĉinion kaj sendu viajn eminentajn personojn helpi ĝin. Mi bezonas la helpon de viaj membroj por plenumi mian grandan aferon."

### ĈINAJ HERBODROGOJ EFIKAS EN PREVENTO KAJ KURACO DE AIDESO

Specialistoj de diversaj landoj serĉas rimedojn por kuraci aideson. Ili trovis, ke tradiciaj ĉinaj herbodrogoj havas bonan efikon por preventi kaj kuraci aideson, kaj espereble venkos "la peston de la 20-a jarcento".

Specialistoj de la ĉina medicino opinias, ke ĉinaj herbodro-

goj havas jenajn farmakologiajn trajtojn en kuracado de aideso:

Unue, preventi aideson. Oni faris preventan kuracon al suferantoj de aides-viruso en iu regiono de Afriko per tradiciaj ĉinaj herbodrogoj. Post unujara observado ili trovis, ke la morbokvanto de suferantoj estas nur 1%, dum la morbokvanto de suferantoj, kiuj ne akceptis tian kuracon, estas 8%.

Due, mildigi simptomojn kaj longigi la vivon de aides-suferantoj. Longa uzado de ĉinaj herbodrogoj laŭ diagnozo kaj kuraco surbaze de malsano-analizo povas vekti apetiton de suferantoj, forigi febron, grandigi korpopezon, ĉesigi lakson, malgrandigi tumoron aŭ limfonodojn, normaligi la sangan konsiston kaj eĉ reakirigi laborkapablon al multaj suferantoj.

Trie, ataki kaj ekstermi aides-viruson. Specialistoj de la Floridŝtata Universitato de Usono konstatis post esploro, ke substanco ekstraktita el pinokonuso de cembro bone inhibicias aides-viruson. Krome, oni trovis ankaŭ, ke la tradiciaj ĉinaj herbodrogoj, kiaj ajlo, semo de arktio, senecio (*Senecio scandens*) kaj albumino de ricino (*Ricinus communis*), povas ekstermi aides-viruson pli-malpli.

Kvare, kuraci aideson per plifortigo de imuneco kaj forigo de malsanigaj faktoroj. La teorio de la tradicia ĉina medicino opinias, ke oni devas alpreni la nomitan metodon por kuraci aideson, t.e. fortigi la korpon kaj forigi febron kaj viruson, kondiĉe ke la simptomoj estas evidentaĵoj. Por tiu celo oni povas uzi multajn ĉinajn herbodrogojn.

### OK DIALEKTOJ DE ĈINIO

**Norda dialekto.** La dialekto, kun la pekina dialekto kiel la ĉefa, estas parolata en la regiono norde de Yangzi-rivero, Sichuan, Yun-

nan, Guizhou, nordokcidentaj Hubei kaj Hunan kaj norda Guangxi. Pli ol 70 procentoj da han-oj de la lando parolas la dialekton.

**Wu-dialekto.** La dialekto, reprezentata de la ŝanhaja dialekto, estas en suda Jiangsu, Ŝanhajo kaj Zhejiang. 8.4 procentoj da han-oj de la lando parolas la dialekton.

**Hunan-a dialekto.** La dialekto, kun la Changsha-a dialekto kiel la ĉefa, estas en la provinco Hunan. Ĝin parolas 5 procentoj da han-oj de la lando.

**Jiangxi-a dialekto.** Ĝi, reprezentata de la Nanchang-a dialekto, estas parolata ĉefe en Jiangxi-provinco kaj sudorienta Hubei. Ĝin parolas 2.4 procentoj da han-oj de la lando.

**Kejia-dialekto.** Ĝi, kun Meixian-dialekto kiel la ĉefa, estas parolata en la norda, suda kaj orienta partoj de Guangdong, la sudorienta parto de Guangxi, la okcidenta parto de Fujian, la suda parto de Jiangxi kaj iuj lokoj de Hunan kaj Sichuan. La loĝantoj, kiuj parolas ĝin, konsistigas 4 procentojn da han-oj de la lando.

**Guangdong-a dialekto.** La dialekto, kun la kantona dialekto kiel la ĉefa, estas parolata de loĝantoj de Guangdong kaj sudorienta Guangxi, kiuj konsistigas 5 procentojn da han-oj de Ĉinio.

**La dialekto de norda Fujian.** Ĝi estas reprezentata de la Fuzhou-a dialekto kaj parolata de 1.2 procentoj da han-oj de la lando.

**La dialekto de suda Fujian.** Ĝi, kun la Xiamen-a dialekto kiel la ĉefa, estas parolata de 3 procentoj da han-oj de la lando. Ankaŭ multaj elmigrintaj ĉinoj en sudorienta Azio parolas la dialekton.

# Novaj metodoj de ĉin- medicinaj kuracistoj

de SUN GUOLIANG kaj DU JUNXIAO

**P**REVENTI kaj kuraci malsanojn per la ĉina medicino estas grava metodo en la disvolviĝanta kuraca kaj saniga afero de Ĉinio. En la subprovinco Yuncheng de Shanxi-provinco ni trovis, ke en tiu loko servas pli ol cent malgrandaj fakaj hospitaloj, kies fondintoj senescepte estis ĉin-medicinaj kuracistoj. En kuraco de malfacile kuraceblaj malsanoj ili ĉiuj posedas sian apartan metodon.

## NOVA KURACMETODO KONTRAŬ TUBERKULOZO

Kiam ni vidis Jiao Anguo, estron de la ĉin-medicina hospitalo de tuberkulozo, ni miris de tio, ke la fameta tuberkuloza fakulo estas nur 28-jara.

Ŝajne li jam rimarkis nian miron kaj diris al ni kun rideto: "Mia patro estis la fondinto de la hospitalo kaj forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Mi heredis lian karieron."

"Sed vi ja estas pli fama ol via patro!"

Jiao Anguo forte skuis la kapon.

"Tuberkulozo ne estas plu malsano nekuracebla, sed la sukcesoj de la kuraco en malsamaj hospitaloj estas diferencaj. Kion vi konsideris prenante tiun aferon kiel vian karieron?" Jiao Anguo diris al ni, ke plejparto de la tuberkulozuloj povas resaniĝi dank' al streptomicino, rimifono, rifampino k.a. kontraŭtuberkulozaj medikamentoj. Sed pro neakurata prenado de medikamentoj, infekto de drogorezistaj rasoj de bakterioj, longtempa kaj grandkvanta prenado de medikamentoj aŭ anormala korpokon-

stitucio aperis eksterordinaraj malsanuloj, en kies korpoj aperis rezisto kontraŭ kemiaj medikamentoj, toksigo aŭ anafilaksia reago. Kemiterapio ne efikas sur ilin, sekve ilia malsano serioziĝas kaj minacas la vivon. Oni urĝe bezonas novan kontraŭtuberkulozan kuracmetodon por anstataŭigi per ĝi la senefikan kemiterapion. Post longtempa esplorado kaj klinika praktikado, Jiao Anguo sukcesis elfari ĉinmedicinan kataplasmon. Tiu kataplasmo efikas ne nur sur ordinarajn tuberkulozulojn, sed ankaŭ sur la malsanulojn, kiuj havas en si reziston kontraŭ kemia terapio, toksigon aŭ anafilaksian reagon. Pli ĝojinde estas, ke multe rapidiĝis resaniĝo de suferantoj de tuberkulozo kun tipo de fibra kavo.

En la hospitalo ni trovis, ke la nova metodo estas tre simpla. Por kuraci ftizon kaj tuberkulozon de internaj organoj, oni metas la kataplasmon sur la koncernan korpoparton de malsana organo kaj akupunkturajn punktojn respondajn al la malsano. Kontraŭ tuberkulozo de la supra parto de la dekstra pulmo, oni ŝmiras per la kataplasmo la dekstran supran parton de la brusto kaj la respondajn akupunkturajn punktojn *dazhui*, *shanzhong* k.a.

Doktoro Jiao Anguo konigis al ni, ke la kataplasmo efikas sur la ostan kaj limfan tuberkulozon ĉu pusan ĉu nepusan. Se ulceriĝis la tuberkulozo, oni devas unue ŝmiri per karnokreskiga medikamento kaj poste per la kataplasmo. Cetere, la malsanuloj devas preni kelkajn ĉinajn drogojn.

Estis junulino Dong Fengxian veninta de Xiaxian-gubernio de Shanxi-provinco. Ŝi suferis de ftizo ok monatojn. Ŝi vizitis 5 hospitalojn kaj ne sukcesis resanigi sin. Ŝi venis al la hospitalo kaj post dumonata kuracado ŝia sangosedimento malaltiĝis de 105 ĝis 6. Ŝi resaniĝis kaj edziniĝis en la sama jaro. La sekvantan jaron ŝi naskis du ĝemelojn.

S-ino Onota Masue en Osaka de Japanio suferis de tuberkuloza pleŭrito. Kemiterapio en Japanio kaŭzis al ŝi toksigon pro drogorezisteco. Ŝi ricevis de d-ro Jiao Anguo medikamentojn kaj resaniĝis. Ŝi speciale venis al Yuncheng por esprimi dankon al la d-ro.

La hospitalo kuracis milojn da ĉinoj, usonanoj, germanoj kaj filipinanoj, kaj 71.3 procentoj el ili estis resanigitaj.

En 1989 la kuracmetodo de tuberkulozo per la kataplasmo Huishenggao trapasis provincan ekspertizon. La fakuloj konkludis, ke la metodo estas bonefika, rapida, facile aplikebla kaj nemulte kosta.

Nun la hospitalo kuracas malsanulojn ĉefe per korespondo. Malsanuloj povas nur sendi al la hospitalo sian kazohistorion, la hospitalo faras diagnozon kaj sendas Huishenggao kaj aliajn medikamentojn al la pacientoj.

## KURACO DE SURDECO PER ĈIGONGO

Kiam ni venis al la kuracejo de Shao Kangli, li estis sin ekzercanta per ĉigongo. Li estis tiel absorbata, ke ni ne volis interrompi lian ek-





Doktoro Shao Kangli kuracas per ĉigong-terapio.



Doktoro Jiao Anguo (maldekstre) kaj lia helpantino en esplorado pri kuraco

zercadon kaj atendis lin unu horon.

“Oni diris, ke via kuraco per ĉigongo bone efikas sur surdulon, sed multaj homoj rigardas ĉigongon mistera. Kiel vi opinias pri tio?” ni demandis lin.

Post momenta pripensado d-ro Shao diris: “Ĉigongo estas scienco, tamen ne mistera. Kelkaj fenomenoj estas ne klarigeblaj nun, sed oni certe povos klarigi ilin estonte. Ni devas nek esti superstiĉaj al ĝi, nek absolute nei ĝin. Mi kuracis per mia metodo pli ol 3 000 surdulojn en pluraj jaroj, kaj la metodo efikis sur 71.4 procentojn de la pacientoj. Inter la pacientoj la plej aĝa estas 72-jara kaj la plej juna nur 3-jara. Kelkaj resaniĝis en 2-3 monatoj, kaj aliaj bezonas kuracon de longa tempo.”

Ĉe la diro li montris al mi stakon da leteroj. Iu junulo en Henan-provinco skribis en sia letero: “Doktoro Shao, mi dronis en tristeco, post kiam mi eksuferis de nerva surdeco. Mia amatino iam intencis rompi kun mi, ke mi ne povis kolombumi kun ŝi. Nun ĉio boniĝis, via kuraco savis min el senespero. Nun mi povas aŭdi birdan pepadon, riveran lirlon kaj ankaŭ ŝian flustradon. Vi redonis al mi la aŭdon...”

Iu ĉeestanta medicinisto diris al ni: “D-ro Shao ofte ricevas tiajn leterojn.”

Doktoro Shao diris al ni, ke la kuracmetodo de surdeco estas

kompleksa metodo el ĉigonga akupunkturo, masaĝo, ĉinmedicinaj medikamentoj kaj terapio de instrumentoj.

La teorio de la tradicia ĉina medicino opinias, ke surdecon kaŭzas malforteco de la renoj. Troa laco malfortigas la renojn, kio malakrigas aŭdadon. Laŭ tiu teorio, doktoro Shao elfaris pilolojn “Fucongwan n-ro 1-5” resanigaj kaj *ĝingluo*-vigligaj. La medikamento bone efikas. La ĉigonga akupunkturo, masaĝo kaj terapio de instrumentoj ludas la saman rolon. La kuracmetodo akcelas sangocirkuladon en interna orelo, malstreĉas la miringon kaj vigligas la harĉelojn de aŭdnervoj, fortigas la malsanulojn je la kapablo de memriparado kaj imunpovo kaj redonas al ili la aŭdkapablon.

Nun d-ro Shao resumis sian sperton de multaj jaroj kaj verkis libron “Ĉigongo kaj reaŭdigo”, en kiu li detale konigis la kaŭzon, patologion, ekzamenmetodon, diaĝnozozon de surdeco kaj konvaleskan trejnadon por restarigo de aŭdo kaj parolo.

## METODO KONTRAŬ HEMIPLEGIO

Antaŭ nelonge ni raportis al niaj legantoj pri du hospitaloj, kiuj kuracas hemiplecion. Nun ni konigas specialiston d-ro Wang Qichang pri hemiplegio. Li kuracas ne nur hemiplecion kaŭzitan de cerbovaskulaj malsanoj, sed ankaŭ paralizon de malsupraj membroj

kaŭzitan de vundo de mjelo.

D-ro Wang Qichang diris al ni: “Kontraŭ ĉiu malsano oni trovos medikamenton.” Kun tiu konvinko li esplordis por trovi recepton kontraŭ hemiplegio. Li legis multajn klasikajn librojn de ĉina medicino, analizis kaj studis drogherbojn notitajn en la libroj. Post longa penado li elfaris recepton el 48 drogoj.

Tiam laboristo Han Cunli de farunejo de la gubernio Pinglu de Shanxi-provinco falis en puton kaj lia 12-a vertebro rompiĝis je kelke da pecoj. Li paralizigis. D-ro Wang Qichang venis al la malsanulo kaj donis al li sian recepton. Li flegis lin tri tagojn kaj tri noktojn kaj vidis, ke ruĝiĝis la vangoj de la malsanulo. Post 50 tagoj la malsanulo stariĝis kaj povis iri per si mem.

Disvastiĝis la informo pri la resaniĝo de Han, kaj pli kaj pli multaj malsanuloj venis peti helpon de Wang Qichang. Li daŭre laboris konsciencie kaj analizis ĉiun kazon por doni respondan kuracmetodon, serĉadis komunecon de la kazoj por trovi la leĝon. Fine li reduktis la drogojn de 48 al 28 specoj kaj elfaris pilolon “Jiaorongwan”.

Ekspertizo de fakuloj raportis, ke la pilolo efikis sur ĉiujn malsanulojn senescepte, kaj 82 procentoj de la malsanuloj estis resanigitaj. Sed Wang Qichang diris modeste: “La sukceso estas negranda, ke mi ne povas kuraci ĉiujn specojn de hemiplegio.” ■

## ESP-NOVAĴOJ

● Petate de la Kobe E-Societo, Japanio, la Tianjin-a E-Asocio multe subtenis la aktivadon de kobeama amuziĝo, popola festo okazinta la 17-an de majo ĉijare, donacante al ĝi 2 delikatajn ĉinstilajn pentraĵojn, 100 kaligrafiaĵojn, poŝtmarkojn, memorkovertojn, skulptaĵojn, kajtojn, silkajn tukojn k.a.

La Tianjin-a Televido 3-foje raportis pri la aktivado de kobeama amuziĝo.

● Maje de 1991, la Pekina Lingva Instituto okazigis artan festivalon. La teatro "Aventuro en Restoracio", verkita kaj reĝisorita de s-ro Li Weilun, instruisto de Esperanto, akiris premion.

La teatro rakontas, ke kelkaj turistoj el malsamaj landoj prenas manĝaĵojn en restoracio de Guangdong kaj faris nemalmultajn ridindaĵojn pro lingva baro. Finfine, ili komprenis unu alian dank' al Esperanto. La teatro estis prezentita en la lingvoj angla, franca, hispana, japana, araba, ĉina kaj Es-



Stampo por la 80 Jaroj de EM en Changshu

peranta. La Centra Popola Radiostacio dissendis ĝian fragmenton en la programero "La 8-a kaj duono, ĉivespere" la 15-an de majo.

Marte de 1991, la fremdlingva fakultato de la instituto denove ekfunkciigis E-kurson por la duklasaj studentoj, en kiu lernas 52 studentoj. S-ro Li Weilun gvidas la kurson.

● Jam en 1911 E-movado ekfloris en la urbo Changshu, Jiangsu-provinco. Memore la 80-jaran jubileon de sia E-movado, la Changshu-a E-Societo faris memoran stampilon en Esperanto. Ĝia projektinto estas esperantisto Zhang Linrui.

● La E-Asocio sub la Petrolrafina Kemifabriko de Lanzhou, Gansu-provinco, okazigis esperantistan renkontiĝon en parko kaj disdonis 350 materialojn por propagandi Esperanton.

● Internacia Filantropia Muzika Esperanto-studio estos organizita en Sovetunio en aŭtuno 1992. Ĝi estas privata entrepreno, destinita por helpi al muzikistoj laborantaj en originala Esperanta kantoĝenro registri siajn verkojn altkvalite.

La senpaga registrado estas ĝia ĉefa principo. Ili planas funkciigi la studion tiamaniere: vi, kiu interesiĝas pri la afero, sendu al ĝi viajn muziknotojn aŭ demonstraĵojn kasetojn, fotojn ktp. Se viaj sendaĵoj interesas ilin, vi rajtas anticipemendi tempon por via registrado.

● Bulteno "Muziko" daŭrigas sian ekzistadon kaj nun eldoniĝas kun nova plibonigita enhavo en Bulgario. Ĝi daŭre estas ligilo kaj informilo por niaj muzikesperantistoj, por nia MEL-anaro kaj aperas trifoje jare. Adreso de la redakcio: Milin kamak 58, 1421 Sofia, Bulgario. Redaktoro: Dimitar Terziev.


● En la Nacia Teknologia Universitato en la urbo Rosario, Argentino, okazis je la 25-a k. 26-a

de marto 1991 dekhora kurso pri kibernetiko en la Internacia Lingvo Esperanto, sub la gvidado de la germana sciencisto prof. D-ro Helmar G. Frank, kun samtempa traduko fare de Alicia Toffi, prezidantino de Rosaria Esperanto-Asocio. Ĝin partoprenis 46 docentoj kaj studentoj. Tio estis la dua fojo ke oni oficiale uzis Esperanton kiel laborlingvon ĉe la loka universitato.

● Unuan fojon en sia historio IFEF organizis sian kongreson en Ĉeĥoslovakio. Temis pri la 43-a kongreso de IFEF en Moravia urbo Olomouc okazinta dum tagoj 11-17 de majo, 1991, kiun partoprenis ĉ. 400 esperantistoj el 21 landoj. Dum la kongreso poŝtofiĉejo uzadis E-maŝinstampilon kun teksto: "43-a IFEF Kongreso 11.-17.05.1991 Olomouc, Ĉeĥoslovakio", kaj ankaŭ la poŝtofiĉejo en urbo Straznice propagandis tiun ĉi kongreson per porokaza E-afrankmaŝinstampilo kun ĉefa teksto.

● Samarkandaj esperantistoj organizos fine de 1991 grandampleksan internacian ekspozicion kun titolo "Arkoj de l' Mondo". Tiucele estas serĉataj ĉiuspecaj ĉiulingvaj tiutemaj fotoj, bildkartoj, pentraĵoj, desegnaĵoj, insignoj, turismaj aferoj, prospektoj kaj aliaj materialoj pri diversaj arkoj en la tuta mondo. Ĉiu kontribuinto ricevos belajn bildkartojn pri vidindaĵoj de la antikva 2500-jara Samarkando kaj laŭdezire aliajn uzbekajn memoraĵojn. Samarkanda Esperanto-Klubo, SU 703000 Samarkando, P.O. Box 76, Uzbekistano, USSR.

D-ro Helmar G. Frank prelegas pri kibernetiko.






# Bildoj sur fotografa papero

Teksto de LIU SIGONG

Bildoj de ZHAO YILI

Zhao Yili estas belartistino de la Ĝenerala Fabriko de Radioaparatoj de Changzhou, Jiangsu-provinco. Ŝi grifele gravuras bildon sur kolora fotografa papero, kaj ĝi donas specifan efekton kaj apartan ĉarmon. Ŝiaj verkoj estas alte taksataj de la belartistaj kaj metiartistaj rondoj.


Traktite en kamero per ekspono, lumliko k.a., la kolora fotografa papero donas riĉajn lumombron kaj kolorajn nuancojn. El tio ŝi estis inspirita. Per diversaj teknikoj de grifelado kaj malsamaj fortoj, ŝi gravuras sur kolora papero kaj intensigas ĝian efekton, ke la kreitaj figuroj estas vivoveraj kaj ĝuigas belecon. La bildo allogas per harmonio inter koloro kaj figuro kaj multe bonvenas al rigardantoj.




Retrorigardo

Zhao Yili en laboro






Aütuna lotuso




Lotusfloro

Dezerto







Knabino

Nokta reveno



## Matene de la Patrino Tago

**M**IA okjara fileto Justeno ŝatis vagadi senfare. Ĉiam li motivis sian petolaĵon. Ĉiutage, kiam li estis ironta al lernejo, mi adiaŭis lin per kiso kaj atentigis lin: "Revenu hejmen nepre antaŭ la tria horo posttagmeze."

Mi ne estis fiero pri mia faro, mi estis hezita, ĉu mi devas esti severa aŭ drolota. Sed matene de la Patrino Tago perdiĝis Justeno.

Antaŭvespere de tiu tago, ĉe la manĝotablo, miaj du pliaĝaj infanoj sugestis al mi, ke mi ricevos en surpriziĝo iliajn donacojn en la sekvanta tago. Sed Justeno sidis senparole. Poste la infanoj eliris kaj enlitiĝis.

En la sekvanta mateno, apenaŭ batis la sesa, mia filino hastis en mian ĉambron: "Justeno ne estas en la lito." Mi eksaltis kaj konjektis, ke li televidas en alia ĉambro. Sed li ne estis tie. Mi vokis lin, sed estis neniu respondo. "Ĉu li kaŝiĝis?" Mi priserĉis la tutan domon: sub la lito, en murŝrankoj... Kaj fine mi eliris el la domo.

Estis dimanĉo, kaj la kutime brua strato nun estis kvietita, ĉar oni ne ellitiĝis tiel frue. La biciklo de Justeno staris ĉe la pordo. Sur la lito estis malordaj litaĵoj. Li eliris nudpiede. Se hodiaŭ ne estus la Patrino Tago, mi povus trovi lian motivon de foresto. Sed hodiaŭ estis la Patrino Tago, kaj mi ne povis imagi la kialon.

Mi kaj miaj infanoj vokadis dudek minutojn sur la strato. Mi devis peti helpon de la polico. Mi telefonis kun retenita timego, ke mia infano perdiĝis.

La deĵoranta policano senĉese konsolis min kaj promesis tuj sendi helpanton. Mi demetis la telefon-



on kaj cerbumis, kien Justeno iris kaj kial li tien iris. Kiam mi preskaŭ malesperigis, subite mi ekpensis pri mia florbedo. Por atingi ĝin necesas transiri kvar stratojn. Sed mi ne povis kompreni, kial li iris tien. Tamen ĝi estis la loko, nur kie mi ne serĉis. Mi sidigis en la aŭton kaj malrapide veturis tien.

Sur la unua strato mi ne trovis lin, kaj ankaŭ sur la dua kaj tria stratoj mi ne trovis lin. Mi vidis lin sur la kvara strato. Li estis malvigle iranta returne, en negliĝo, sen ŝuoj. Ĉi-momente malŝarĝigis mia koro.

Kiam li enrampis en la aŭton, mi demandis lin: "Kial vi venis tien?" Li ekploris.

"Mi volas iri al via florbedo," li ekploreis. Mi prenis lin en mian sinon kaj sentis, ke lia malgranda korpo forte alpremiĝis al mi.

"Kial tien?"

"Ĉar," li diris singultante, "mi vekigis kaj ekmemoris, ke hodiaŭ estas la Patrino Tago kaj mi ankoraŭ ne pretigis donacon al vi, mi volis preni bukedon da floroj por vi. Sed kiam mi venis ĉi tien, mi ekmemoris, ke vi ne permesas al mi transiri sola la straton."

Ĉiutage ni riĉigas nian memoron per neforgeseblaj scenoj de la vivo. Kiam mi fiksas mian rigardon sur lia vizaĝo, mi konvinkiĝis, ke mi memoros dum mia tuta vivo la scenon: matene de la Patrino Tago, nudpieda knabo en negliĝo, sola sur senhoma strato. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Yang Aidong, 29-j., dez. kor. tm., interŝ. pm., precipe serĉ. esperantajn pm. kaj poŝtaĵojn. Helpe serĉ. ion, kion oni bezonas. Adr.:

Liang Tou Jie 831 Hao, Dandong, 118009, Liaoning, Ĉinio.

\* Wang Yongfang, 22-j. fraŭlino, dez. kor. tm. pri vivo, estonteco, kaj apliko de Esperanto. Adr.: P.O.Box 104, Xiyuan Nancun, Hefei, Anhui 230031, Ĉinio.

\* La membroj de Liaoyang-a Esperanto-Asocio dez. kor. kun esp-istoj de la tuta mondo. Adr.: Li Rongfu, You Dian Ju, 111000 Liaoyang, Liaoning, Ĉinio.

\* Xiao Qiu dez. kor. tm. pri ko-

lektado de pm. Adr.: P.O.Box 1145, 100007 Peking, Ĉinio.

\* Diversaĝaj geesperantistoj, plejparte komencantoj, dez. korespondi tm. pri diversaj temoj. La komuna adreso: E-klubo "Provinca centro", p.k. 14127, SU-660025 Krasnojarsk, Rusio.

\* Kim Young-jo, 26-j., dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, interesiĝas pri muziko kaj kanto. Adr.: 608-104, Koreio, Pusan-si, Namgu, Kŭan 4-don, 567 (10/1).



# Ŝanhajaj domoj kun ŝtonkadra pordo

Teksto de MEI ZHI

Fotoj de YAN JIN

**S**UR la altano de la Ŝanhaja Televizia Turo 116 metrojn super la tero oni povas vidi, ke vicoj post vicoj da malaltaj domoj kun ruĝa tegmento formas vastajn kvartalojn en Ŝanhajo. La domoj estas konataj kiel ŝanhaja domo kun ŝtonkadra pordo.

La domoj kun ŝtonkadra pordo estas historia heredaĵo de la urbo. Prof. Xu Jingyou, kiu laboras en la Plana kaj Projekta Instituto de Ŝanhajo, konigis al mi, ke Ŝanhajo estas la plej granda industria urbo de Ĉinio kaj ankaŭ unu el la komercaj urboj plejfrue malfermitaj al la eksterlando. Al Ŝanhajo venadis multaj eŭropanoj. Meze de la 19-a jarcento oni koncesiis kvartalojn en Ŝanhajo laŭ maljusta traktato. Unue koncesion prenis Britio, kaj ĝin imitis Usono, Francio k.a. Komence en la koncesiitaj kvartaloj loĝis nur alilandanoj, kaj poste, pro militado multaj riĉuloj de la landinterno de Ĉinio transloĝiĝis en la kvartalojn por eviti danĝeron. Tiam, por sin vivteni ankaŭ kamparanoj kaj ŝipanoj svarmis en la urbon kaj konstruis kabanojn ĉirkaŭ fabrikoj en la kvartaloj. En la 70-aj jaroj de la 19-a jarcento la kvartalaj aŭtoritatoj ordonis mal konstrui la kabanojn, kaj samtempe terbienaj komercistoj konstruis nombron da loĝdomoj en dezerta antaŭurbo de Ŝanhajo. Por plejeble utiligi la teron kaj konformi al la prefero de ĉinoj, oni pro-

jektis tian domon kun ŝtonkadra pordo.

Maljuna sinjorino Zhou, amikino de mia kolego, loĝas en domo kun ŝtonkadra pordo dum multaj jaroj. Kiam mi venis antaŭ ŝian domon, mi vidis altan nigre lakitan duklapan pordon kun kadro masonita el longaj ŝtonpecoj. Super la pordo estas duonronda frontono en eŭropa gusto. Mi forte frapis je la pordo, kaj post longa tempo mi aŭdis brueton de riglilo. La pordo surhavis riglilon anstataŭ seruron. Kun granda peno ŝi malfermis la pordon. Malantaŭ ĝi estis malgranda korteto kaj ĉe la alta muro kreskis vegetaĵoj. La vestiblo servas

kiel gastejo, ŝirmita per ses vitraj fenestropordoj. En la vestiblo oni povas vidi tra la fenestroj nur altan muron. Ŝi diris al mi, ke ĝi estas alta, kiu povas bari fajron de najbaro. Kaj krome, ĝi povas bari ŝteliston. Ligna septo dividis la vestiblon en du partojn. En la malantaŭa parto estis granda lito, vestoŝranko kaj aliaj mebloj. Kaj pli malantaŭe estis kuirejo kaj posta pordo. La ŝanhajanoj kutime en-kaj eliras tra la posta pordo de la domo, jen kial mi devis atendi longan tempon ĉe la antaŭa pordo. Inter la kuirejo kaj la malantaŭa gastejo estis ŝtuparo, kiu estas pli proksima al la posta pordo ol al la

Domoj kun ŝtonkadra pordo al strato



Domoj kun ŝtonkadra pordo








Korteto en domo



Legoĉambro

Gastoĉambro



Strateto inter domoj





antaŭa. La kruta ŝtuparo knaris sub la piedoj, kio sugestis la aĝon de la domo. Ĉe la turniĝo de la ŝtuparo lokiĝas kiosko-ĉambro. Kvankam malalta kaj malhela, tamen ĝi estis ofte menciita de multaj literatoroj, sekve ĝi ĝuis grandan konatecon en Ĉinio. La dormoĉambro de sinjorino Zhou estis en la dua etaĝo. Ĝia strukturo estas sama al tiu de la teretaĝo. Malgranda pordo kondukis al teraso; tie estis vazoj kun floroj kaj vestoj sunumataj. Tie mi klare vidis aliajn domojn kaj eĉ preparadon de manĝaĵo en la transa domo.

Vicoj post vicoj da tiaj domoj formas longajn sakstratetojn. Ĉe la enirejo de multaj stratetoj estas pordego. Vespere oni fermas la pordon, kaj la strateto fariĝas sendependa. Ĝi malfermas pli da spacoj por la vivo. Vespere de someraj tagoj aparta spektaklo regas en ĝi. Tie oni ĝuas malvarmeton kaj ludas ĉinan ŝakon aŭ kartojn, kaj infanoj ludas aŭ faras la hejmtaskon. Kiam varmegas, multaj tranoktas tie en faldebla lito aŭ

Ekzamenado de hejmtasko de infano



kuŝseĝo.


Tia loĝejo distingiĝas per strukturo kompare kun alilokaj loĝdomoj de Ĉinio. La strukturo de domo kun ŝtonkadra pordo, precipe la frutempaj tiaj domoj, konservis la arkitekturan stilon de la tradicia ĉina loĝdomo. La frutempa domo kun ŝtonkadra pordo havas vestiblon, kvadratan korteton kaj ĉambrojn ambaŭ flanke de la korto. Sed tia domo okupis vastan areon kaj ne taŭgis por koncesiitaj kvartaloj en Ŝanhajo. Tial oni konstruis domon en formo, kian ni vidas nuntempe. La strukturo de la domo konformis al la vivmaniero de la malnova Ĉinio, ke kelkaj generacioj de familio vivis kune en sama domo. Kun kresko de loĝantaro en Ŝanhajo domoj kun ŝtonkadra pordo por sola familio pli kaj pli malmultiĝis. Nun la domoj, kia tiu de Zhou, estas malmultaj. En la urbo pluraj, eĉ 7-8 familioj loĝas en sama domo, por ne paroli pri domoj kun flankaj ĉambroj.

Eble pro troloĝateco ŝanhajanoj povas elpensi pli da rimedoj por plejeble utiligi spacon kaj aranĝi la ĉambron en bona ordo. Paro da maljunaj geedzoj kaj ilia filo loĝis en vestiblo. La filo estis edziĝonta kaj ili septis ĝin en 2 partojn per ligna tabulo. Unu el ili kovras nur kelke da kvadrataj metroj. La geedzoj meblis ĝin per lito, sofo, ŝranko k.a. Iu ŝtatoficisto septis sian ĉambron en 2 partojn per memfarita bretaro por luksajetoj. La ekstera parto servas kiel kuirejo kaj la interna kiel legoĉambro kaj gasteoĉambro. Nokte lia fileto dormas sur la kanapo en la gasteoĉambro. La komuna kuirejo kovras dekelkajn kvadratajn metrojn, sed ĝin disponas 5 familioj. Sur la muro pendas multaj potoj. Kia saĝa aranĝo!

Kiel do traktas unu alian la samdomanoj? Mi informiĝis de s-ino Zhou, ke pro troloĝateco najbaroj ofte kverelas pro bagatelajo. Ekzemple, povas esti kverelo, se iu lokis sian tablon en mallarĝan koridoron. Tamen, laŭ mi, la plej maloportuna ne estas reciproka ĝenado, sed manko de nece-

sejo. Oni diris, ke nun en Ŝanhajo oni ankoraŭ uzas 2 milionojn da feksiteloj. Iuj familioj, kies loĝejo estas kompare pli vasta, havas necesejon en la angulo de koridoro, kaj aliaj familioj nur povas loki la feksitelon en la ĉambro. La loĝantoj jam alkiutimiĝis al la medio de la vivo kaj la unua afero por ĉiutaga vivo estas lavi la feksitelon. Iuj opinias pli avantaĝa loĝi en tia domo. Ĝenerale, la familioj, kiuj loĝas en domo kun ŝtonkadra pordo, estas najbaroj de multaj jaroj. Ili komprenas sin reciproke kaj zorgas unu pri alia. Ili preparas manĝon en sama kuirejo, kio alproksimigas ilian koron. En strato, kie estis multaj sekigataj vestoj, mi vidis, ke iu avino ĝuanta malvarmeton levis littukon de sur la tero kaj krie serĉis ĝian posedanton. Domoj kun ŝtonkadra pordo plejparte sidas apud komercaj kvartaloj kaj tiuj ĉe strato servas kiel butikoj. En la loko regas facila trafiko, kio oportunas ne nur al veturado al laborejoj sed ankaŭ al aĉetado. La domo de s-ino Zhou distancas de la plej vigla komerca Nankin-strato tre proksime. El tio mi iom komprenis, kial malnovaj familioj preferas domon kun ŝtonkadra pordo al apartamentaro en la ĉirkaŭurbo.

Pravas la diro, ke domo kun ŝtonkadra pordo estas miniaturo de la granda Ŝanhajo. En la pasinta longa tempo la urbanoj trenis sian mizeran vivon, revoluciuloj faris sekretan aktivadon (antaŭ 70 jaroj oni okazigis la Unuan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio en domo kun ŝtonkadra pordo en Ŝanhajo), literatoroj, erudiciuloj kaj artistoj plenumis tie siajn verkojn. En domoj kun ŝtonkadra pordo funkciis ankaŭ fabrikoj, bankoj, gastejoj, staplejoj, redaktejoj, lernejoj, hazardludejoj k.a. Nuntempe triono de la ŝanhajanoj ankoraŭ loĝas en tiaj domoj. Tial por koni la pasintecon kaj estantecon de la urbo kaj ties loĝantojn, oni nepre devas rigardi tian domon kaj viziti ĝiajn loĝantojn. ■



Enirejo de strateto



Infanoj antaŭ domo kun ŝtonkadra pordo

Najbaroj en ŝakludo





# JOGJAKARTA

La urbo Jogjakarta meze de Javo de Indonezio estas lulilo de Javo-kulturo. Jam antaŭ la sepa jarcento oni enkondukis budhismon el Hindio kaj fondis tie grandan budhisman regnon el la insuloj Javo, Balio kaj Sumatro.


Hodiaŭ Jogjakarta ankoraŭ gustas je antikveco. Promenante sur strato, vi povas vidi, krom modernaj aŭtomobiloj kaj strataj lampoj, ankaŭ ruĝtegmentajn blankajn domojn kaj arĝentkolorajn moskeojn ambaŭflanke de la strato, en antikva stilo.

Estas tre multaj pasantoj kaj plejparto de ili portas tradiciajn indoneziajn kostumojn. La viroj portas nigran veluran ĉapon, altkoluman ĉemizon kaj sarongon, kaj la knabinoj, nudpiedaj kun hartubero sur la kapo, portas veston el gazo. De tempo al tempo belkoloraj pasaĝeraj tricikloj veturas rapide inter pasantoj.


La plej antikvan guston havas la Sultana Palaco en la urbocentro, konstruita en 1756 kaj rigardata kiel "urbo en urbo". Okcidente de la palaco estas bazaro de birdoj. Jogjakarta famas en la lando pro birdobredado kaj kokobatalo. Tie butikoj staras unu apud alia kaj ekster ili pendas diversgrandaj birdokaĝoj en malsamaj formoj. La kaĝoj freŝe koloritaj spiras tropikan etoson.


Krome, la lokanoj bredas en grandegaj kaĝoj ankaŭ virkokojn por batalo. Laŭdire, post dek semajnoj la malliberigitaj kokoj pretas batali. Jen kial ĉiuj enkaĝigitaj kokoj kun larĝe malfermitaj okuloj aspektas batalemaj.

En festotago urbanoj prezentas, portante gigantan ventumilon el pavaj plumoj.



En bazaro de birdoj





Tradicia konstruaĵo kaj antikva kabrioletoj


En popol-danca prezentado



Triciklo sur strato







Venas aŭtuno.

de **MARIÉT HOOGELAND** (Nederlando)

Roko de Aver, Aŭstralio

de **ROMA THORSEN** (Danlando)

